# Sur Posteno

**Oficiala organo de IPE - Internacia eldono**

| Tria jaro N-o 37-38 | Aperas monate | AŬG.-SEPT. 1935 |
|---|---|---|


**Prezo de tiu ĉi n-o fl 0.15**

Pro publikigo de la kongres-protokolo ni devis prokrasti aperigon de multe da alia materialo.
En la venonta n-o aperas la daŭrigo k verŝajne la fino de la protokolo.

La SP-redakcio.

# IPE OKAZIGIS SIAN DUAN

**H. Barbusse: honora prezidanto. Partoprenis 129 gek-doj el 13 landoj, inter kiuj 13 IPE-gedelegitoj el 8 landoj. Ĉeestis 3-membra delegitaro de la SAT-kongreso.**

*La 2-a IPE-Kongreso en Antverpeno 10-15.8.1935) estis konsekvenca daŭrigo de la lasta laborjaro. La elstara impreso estas la antaŭenemo de la IPE-anoj, la volo ne resti ĉe atingoj, sed marŝi plu. Tiun volon klare montris la unuanima konsento pri starigo de Internacia PEK-Centro en Britio k la seriozo, kiu direktis la diskutojn pri unueca fronto inter diverstendencaj proletesp-istoj.*

Jam antaŭ kongreskomenciĝo, kiam la alvenintaj gek-doj ankoraŭ grupe inspektis la ekspozicion, modele aranĝitan de la KK, diskoniĝis, ke H. Barbusse estis transpreninta honorprezidantecon de la 2-a IPE-Kongreso. Multaj opiniis eĉ, ke la telegramo en esp-o sendita el Moskvo estus kvazaŭ anonco pri persona veno...



H. BARBUSSE

Sed ne malpli forte leviĝis la aplaŭdo, kiam k-do Van Dooren, la sekretario de la KK en la malferma kunsido legis la saluton de tiu mondkonata batalinto kontraŭ faŝismo k milito.

El la amaso da saluteteroj de IPE-organizoj el Aŭstrio, Ĉinio, Japanio, Svedio, Sovetio ktp. distingiĝis unu de la Britia Sendependa Laborista Partio. Jen atesto pli, pri la diverstendenceco de IPE, pri ĝia interligiĝo kun neesp-istaj amasoj.

En la prezidantaron de la 2-a elektiĝis plejparte tute novaj IPE-funkciuloj, kio konkludigas pri la renoviĝo k plilarĝiĝo de la funkciula stabo.

La kongresprezidantaro ne havis malfacilan taskon. Ja kontakto kun la kongresanoj tuj ekestis. Solidaraj, interhelpaj ligoj nevideble ŝpiniĝis de la kongresanaro al la prezida tablo k inverse.

Oni povus atendi, ke la kongreson eksterordinare regus la problemo pri uf. Sed nun ni pozitive devas konstati, ke la uf-diskutoj unuagrade elvokis entuziasmon ĉe delegitoj k kongresanoj. Tio estis rimarklebla tuj ĉe la komenciĝo de la diskutoj pri la Ideologia Raporto de la IPE-Centro, kiu detale tuŝas uf-ajn demandojn.

Eble ankaŭ tial la anonco pri vizito de delegitaro, komisiita de la Pariza SAT-kongreso al la 2-a IPE-Kongreso ne kaŭzis surprizon. Ĉiuj sentis ke uf proletesp-ista ne plu samas kun nura teorio. IPE dum monatoj diversmaniere estis alvokinta al la SAT-Kongresanaro kunvenonta en Parizo, formi delegitaron al 2-a IPE-Kongreso por unuecakcelaj diskutoj. Multaj jam sciis, ke dum la SAT-Kongreso okazis « draŝnecaj » diskutoj pri tiu ĉi punkto. La sincera uf-laboro de IPE ne restis senrezulta. La *SAT-delegitaro* efektive venis. Ĝi trovis k-decan akcepton ĉe ĉiuj anoj de la 2-a IPE-Kongreso.

Okazis komuna kunsido de 3 delegitoj de IPE-Kongreso k la 3 SAT-k-doj delegitaj de la SAT-Kongreso. Montriĝis ja, ke la SAT-anoj ne estis informitaj de sia organizo pri la uf-aj proponoj de IPE (en SP 31). Tio malfaciligis la diskuton pri principa, uf kunlaboro k necesigis akcepti kiel bazon la leteron de la SAT-Plenum-Komitato senditan laŭ komisio de la SAT-Kongreso al la IPE-C k 2-a IPE-Kongreso.

Tamen, unua paŝo estas farita. Post la kunsido kun la SAT-delegitoj la 3 IPE-reprezentantoj prezentis speciale verkitan rezolucion pri uf al la IPE-Kongreso, kiu aperos kune kun alia materialo en venonta n-o de SP. Ankaŭ la SAT-delegitoj konsentis pri starigo de Internacia Komitato Unueciga en Parizo. La IPE-kongreso komisiis 3 parizajn k-dojn speciale okupiĝi pri la ekfunkciigo de tiu Komitato.

Viglajn diskutojn sekvigis ankaŭ la propono pri starigo de Internacia PEK-Centro. Ja ne ĝustas paroli pri propono. Estis ĝenerala volo, diktita de sentita manko, « popoldeziro », ke funkciu institucio por direkti la praktikan agadon de IPE.

Pri la « kieo » ne perdiĝis multaj vortoj. PEK-Centro, Edinburgo k k-do Turner rapide fariĝis sinonimoj. Nomita k-do dum kongresaj k privataj diskutoj ĉiam reakcentis la neceson « ion fari ». Kiam li en la fina kunsido elpuŝis la vortojn: « Kun nia laboro ni iru al la manlaboristoj, kiuj akiras sian panon per ŝvito. Supreniulu la manikojn! Pli da peranteco, pli da proleteco! » jam ĉiu konvinkiĝis, ke la decido de la kongreso estis celtrafa: PEK-Centro estas en Edinburgo.

Blanklandoj, escepte de Germanio ne estis reprezentitaj. Sed la alvenintaj raportoj teksis sufiĉe rezistan kontakton kun neleĝe batalantaj k-doj. La raportoj de Aŭstrio (prezentita de k-dino van Duin, Nederlando) k de Japanio (prezentita de k-dino Kandel, Nederlando laŭ komisio de japaniaj k-doj) estis akceptita kun ripeta aplaŭdo.

Dum la sabata vespero (10.8) varbokunveno k publika salutvespero kunvenigis salonplenon da antverpenaj gelaboristoj. Dekduo da reprezentantoj de diversaj laboristaj organizoj (Kompartio, ILH, Virinligo antifaŝista ktp) salutparole esprimis la komunecon de ilia batalo kun tiu de IPE. Specialan simpation la proletesp-istoj kontribuis al la reprezentanto de belgia ateista ligo « La Solidaranoj », kiu solvis la rimarkeble regantan lingvoproblemon per verve aŭdigata esp-parolado. Tiel same agis reprezentanto de la « Teknokratoj ».

Tiamaniere la signifo de nia kongreso portiĝis trans la kadron de nia propra organizo. Ĉiutage nin vizitis raportisto de la belgia gazeto « La Tago » (De Dag), kiu intervjuis jen tiun, jen alian. La rezulto ĉiam kaŭzis etan sensacion, se la alilandaj kongresanoj, aŭskultante la tradukadon de belgia k-do informiĝis pri la prikongresaj artikoloj.

Ĉe tramhaltejo antaŭ la stacidomo flirtis 2 esp-flagoj (provizore sen ruĝkoloro), oficiale pendigitaj de la antverpena urbestraro, cetere la sola « subteno » kiun la KK oficiale rajtis ĝui.

La KK sinofere laboris. La sekretario, k-do Van Dooren k liaj helpantoj evoluigis tutajn siajn talentojn de rapidkuruloj, jen forrapidante por aĉeti poŝtmarkojn por tiu, jen informiĝante pri trajnalveno por alia.

Multajn penojn estigis la loĝigo de la kongresanoj. Kelkaj k-doj k k-dinoj pro tio faris devigatan noktpromenadon tra Antverpeno, por trovi malkaran k apertan (*) hotelon. Sed tiaj incidentoj neniel premis la humoron aŭ subfosis la reputacion de la KK. Ĉiuj estis konvinkitaj, ke la antverpenaj k-doj, konsidere al la kondiĉoj, bonege kvitigis sin de sia taskaro.

Estas vere, ke dum la lastaj, antaŭkongresaj tagoj nin ĉiujn malagrable tuŝis penso pri la laboro farenda en la longaj ses tagoj da kongresdaŭro. Tio tuj ŝanĝiĝis en la unua laborkunsido sabate, kiam « la afero komencis ruliĝi ». Kaj, dum la ekskurso al Mehleno, aranĝita de la KK en la lasta kongrestago jam regis ĝenerala opinio, ke sestaga kongresdaŭro estas tute malsufiĉa...

Nun jam delonge la kongresintoj diskuris. En siaj grupoj ili raportas pri la 2-a k penas sin k aliajn jungi en la IPE-ĉaron, por ĝin antaŭentreni ĝis Parizo, ĝis la tria!

---

Dume necesas detale studi la kongresprotokolon, kies unuan parton prezentas al vi hodiaŭa n-o de SP. Ne forgesu, ke tiu ĉi protokolo estas rezulto de sendanka, peniga laboro de niaj geprotokolintoj: k-dino Darvill, k-do Forrest k k-do Wood (Britio) k k-do Rif (Germanio).

Kuraĝe komencu manĝi tiun ĉi spiritan nutrajon, k sancele digestu ĉion (ĉifoje per via cerbo) por la prospero de nia komuna batalo. Ni deziras al vi bonan apetiton.

A. R.

(*) nefermitan.




*Partoprenantoj de la 2-a IPE-Kongreso antaŭ la operа-domo en ANTVERPENO.*

# PROTOKOLARO

## de la 2-a IPE-KONGRESO, 10-15.8.'35 en Antverpeno (Belgio)

*(Por doni al la proletesp-istoj interesataj pri nia movado kiom eble plej rapide detalan superrigardon pri la 2-a IPE-Kongreso ni perjene komencas publikigi la protokolaron en SP.*

*Ni atentigas, ke pro manko de sufiĉe da loko ni devis koncizigi la raportojn, por povi lasi la diskutojn senŝanĝaj.*

*Samnmotive ni enkondukis en la tekston i.a. la mallongigon « uf » (unueca fronto) k akcentas, ke ni neniel celas instigi uzi tiun saman mallongigon en la parola praktiko).*

## UNUA LABORKUNSIDO, 10.8.35. Matene.

*La 2-a IPE-KONGRESO malfermiĝis je la 10.15 h. per « Fratoj al sun' libereco ».*

*Kiel prezidanto de la KK parolas*

K-do VAN DOOREN: Mi malfermas la kongreson en la nomo de la KK k en la nomo de la Belgia UK. Mi salutas ne nur la ĉeestantojn, sed ankaŭ la organizojn, kiujn ili reprezentas. La laboro por la kongreso estis malfacila, sed vidante nun la k-dojn, mi fieras pri la sukceso.

Mi ne deziras longe paroli k unue mi legos salutleterojn. Ne estas eble, legi ilin ĉiujn, ĉar estas tre multe. Mi do legas la plej interesajn.

*(Li legas laŭvice leterojn de SEU, de Hispania PUIL, de Bulgario, de Svisia UK, de Svedio, de NALEA, de Japanio, Aŭstrio, de IFEPE, de okcidenta Germanio.*

*Sub forta aplaŭdo estas legata la telegramo de k-do H. BARBUSSE, kiu bondeziris al la 2-a k konsentis transpreni la honorprezidantecon de la 2-a IPE-Kongreso.*

*Sekvas informo, ke la SAT-Kongreso sendos 4 delegitojn al la IPE-Kongreso por paroli pri uf inter IPE k SAT (aplaŭdoj).*

En la nomo de nia Kongreso mi kore salutas la k-dojn el SAT. La belga registaro donis permeson por ĉiuj veni al la kongreso k permesis al ĉiuj liberan parolrajton, sed neniu rajtas miksiĝi en politikajn aferojn internajn de la belga ŝtato.

*K-do TURNER (Britio) salutas la kongreson en la nomo de BLEA.*

*K-do RESPE salutas en la nomo de IPE-O.*

*K-do CROUTEUX salutparolas por la Internacia Proleta Kooperado k por AEOP.*

*K-do VAN DOOREN proponas por la honorprezidantaro: k-dojn TELMAN, REN, RIP (ĉiuj el Germanio), k-don HRIMA (Bulgario), ĉiun k-don hispanan kiu fariĝis viktimo de la reakcio ke fine DIMITROF k STALIN. Ĉiuj estas akceptitaj unuanime kun aplaŭdado.*

En la *prezidantaron* de la kongreso estas elektataj :

K-do CARLSEN (Danio), k-do VAN DOOREN (Belgio), k-dino VAN DUIN (Nederlando), k-do BERLO (Francio), k-do SMITH (Britio).

En la *proponkomisionon* estas elektataj :

K-dino KANDEL (Nederlando), k-do MALFERE (Francio), k-do TURNER (Britio).

Kiel *protokolantoj* estas elektataj :

K-dino DARVILL(Britio), k-do FORREST (Britio), k-do RIF (Germanio), k-do WOOD (Britio).

La *mandatkomisiono* konsistas el k-doj MORO k VAN DOOREN (Belgio).

K-do RESPE (proponante tagordan ŝanĝon): La raporto pri uf estu ripetata en la TRIA LABORKUNSIDO. La punkto pri lingva laboro de la 13.8 vespere estu kunligita kun la kunsido de la 12.8 vespere. Tiam je la 13.8 vespere ni estos liberaj por diskuti la raporton de la SP-redakcio, EKRELO-eldonplanon ktp.

K-do TURNER: BLEA havis proponon pri tagordo, sed post diskutado ni reprenis ĝin k nun konsentas pri la ŝanĝita tagordo.

*Post kelkaj klarigoj flanke de KK-anoj pri mongo ktp k admono de la prezidanto ĝustatempe reveni al la posttagmeza kunsido la unua laborkunsido estas finita.*

## DUA LABORKUNSIDO, 10.8.35. 14.00 h.

*Prezidas k-do SMITH (Britio).*

*K-do RESPE legas la*

# IDEOLOGIAN RAPORTON DE LA IPE-C

*Prezentinte kelkajn fazojn de la nuna mondsituacio (militpreparo!, faŝismo, socialisma konstruado en USSR) la raporto okupiĝas speciale pri la esp-movado:*

La esp-ista movado ne estas deŝirita de la mondaj okazajoj, la esp-istoj estas vivaj homoj agantaj ekster la esp-kadro en sia socia k politika medio. Tial tiu problemo koncernas ankaŭ ilin, despli, ke posedo de tia mirinda internacia interligo kia esp-o surmetas al ili specialan devigon, helpi per ĝi al la plej vivaj aktualaj interesoj de la homaro. La esp-istoj plejparte apartenas al la amikoj de paco k al la kontraŭuloj de la faŝisma perforto, unuavice la laboristoj de diversaj tendencoj, sed ankaŭ multaj miloj da neŭtralaj esp-istoj, kiuj konsistas el intelektuloj, oficistoj, parte el nekonsciaj laboristoj k junularoj. Se ili eĉ ne estas en sia plimulto aktivaj, ili tamen konfesas demokratismon, pacifismon kaj restintajn splitojn de la homaranismo. Tio ja estas komprenebla pro la liga k internaciiga rolo de esp-o, kiu ne povas ne efiki kune kun aliaj ekonomiaj k kulturaj faktoroj sur la mensojn. Certe ni vidas, ke neŭtrala esp-movado faŝistiĝis aŭ samdirektiĝis en vico da landoj kiel Germanio, Italio, Bulgario, Polio ktp. ke ankaŭ en la neŭtralaj organizoj en t. n. demokrataj landoj ekzistas tendenco subteni faŝisman ideologion kaj reakcion kiel ekzemple la teorion pri bazigo de esp-o sur naciismo. Tamen ni observas, ke la plimulto eĉ en la faŝistaj organizoj ne akceptas la faŝismon k reakcion k nur restas en tiuj organizoj por havi eblon daŭrigi sian esp.-laboron. Plie ni vidas tendencon de progresemaj esperantistoj organiziĝi por pli aktiva socia laboro kiel ekzemple en Japanio, Ĉinio k ankaŭ kreskantajn simpatiojn al la proleta esp.-movado kiuj esprimiĝis en pli ofta kunlaboremo kaj eĉ en transiroj de sufiĉe konataj neŭtralaj intelektuloj al niaj organizoj kiel ekzemple en Anglio k Svisio.

La esp-istoj posedas potencan ilon de la internacia interligo inter la popoloj k ĝuste la batalo kontraŭ la milito k faŝismo nur povas esti efika k venka, se ĉiuj fortoj en diversaj landoj unuiĝas por rezisti al la terura minaco. Estas do la sankta devo de ĉiuj esp-istaj organizoj k de ĉiuj unuopaj esp-istoj meti sian esp.-sciojn k siajn esp.-ligojn je la servo de tiu batalo. Tio estas la unuavica k plej urĝa tasko. La tuta esp.-movado havus nenian socian valoron, se ĝi ne kapablus plenumi tiun taskon. La plenumo de tiu tasko ĝuste gajnos la simpatiojn de la diverslandaj popolamasoj al esp-o, kiuj tiel spertus la utilon de la internacia lingvo.

# PRI UF

Certe la esp-movado ne estas unueca, eĉ ne la laborista esp-movado. Dividas ĝin diversaj mondkonceptoj, diversaj sociaj funkcioj k taktikoj. Sed ilin ĉiujn povas unuigi la aspiro k la agado por defendi la kulturon k la pacon, kies pereo minacas al ĉiuj k es'as nia konvinko, ke sur tiu bazo oni povas k devas organizi larĝan unuecan agadon de esp-istoj kontraŭ la faŝismo k milito. IPE iniciatas la starigon de tiu problemo en la tagordon. Ĝi havas certan rajton por tio, ĉar ĝi estas la plej granda k la plej aktiva esp-organizo de la mondo, kiu de sia fondiĝo mem skribis sur sian standardon la praktikan aplikon de esp-o en batalo kontraŭ faŝismo, milito, socia k nacia subpremado. Se ni hodiaŭ konsekvence traktos la problemon pri uf k kooperado inter IPE k aliaj esp-organizoj, ni antaŭ ĉio devas deklari, ke ne temas pri tiuj artifikaj manovroj por detruo de aliaj organizoj, kiel jam rapidis diskonigi kontraŭuloj de la unueca esp-agado, sed ke temas pri seriozaj konsideroj pri la kondiĉoj de tiu agado, kun partopreno de reprezentantoj de aliaj organizoj.

IPE ne ĉesos deklari, ke ĝia vojo estas la sole ĝusta. Ĝi batalos por konvinki la plimulton de laboristaj esp-istoj pri praveco de sia ideologio k de sia praktika agado.

IPE senhezite daŭras batali kontraŭ ĉiuj kontraŭproletaj k reakciaj ideoj en la esp-movado, same kiel kontraŭ la ideologio de naciismo, de neŭtralismo, tiel ankaŭ kontraŭ la imperialismema, kontraŭsoveta sennaciismo, kontraŭ la disvastigo de ŝajnsocialismaj burĝ-demokratecaj iluzioj, ĉar ĝi ĝuste opinias, ke tiuj ideologioj preparas la grundon por faŝismo k milito k malhelpas la praktikan socivaloran utiligon de esp-o. Tiu principeca pozicio de IPE tamen neniel malhelpas, sed kontraŭe trudas al IPE la taskojn pri organizado de unuecesp-ista agado kontraŭ milito kaj faŝismo. Ni tial ripete deklaras, ke IPE k ĝiaj sekcioj estas pretaj al starigo de uf de agado kun ĉiuj laboristaj esp-organizoj k al kooperado kun antifaŝistemaj k antimilitemaj neŭtralaj grupoj.

La problemo pri uf jam okupis nin kvankam pli teorie, dum la fondkongreso de IPE en 1932 en Berlin, praktike la problemo estis starigita dum la pasintjara IPE-konferenco en Lille. La konferenco difinis, ke la bazo de la uf nur povas esti la praktika agado, precipe PEK.k ke la organiza unueco de la laborista esp-movado nur sukcesos post antaŭa sukcesa uf agado.

# IPE-INVITO PRI UF

Laŭ deziro de la konferenco la IPE-sekretariaro fine de la pasinta jaro dissendis pere de IPE-sekcioj detalan proponaron pri starigo de uf al la ĉefaj ekster-IPE-aj laboristaj esp-asocioj, i. a. al SAT, ISE, al nederlanda LEA, al sveda, al FEO kaj ESFIO k publikigis koncernan alvokon kun la dokumentaro en Sur Posteno, en la sekciaj gazetoj kaj per la radio. Fine ni dissendis al 18 lab. esp-organizoj inviton sendi al nia Kongreso siajn delegitojn por komune konsiliĝi pri la problemo de komuna agado. Ni konstatas, ke la ideoj pri la uf trovis grandegan reeĥon inter la laboristaj esp-istoj. Tio estas facile komprenebla, se oni konsideras la efikon de la progresanta uf inter la amasaj neesp-istaj laboristaj organizoj en Francio, Germanio, Hispanio kaj aliaj landoj.

La raportoj, ricevitaj de IPE-C, el Anglio, el Francio, Aŭstrio k aliaj landoj, la raportoj, publikigitaj en la lastaj n-roj de SP, montras atentindan moviĝon en la afero de la uf, kvankam nesufiĉan. Ni sukcesis dume atingi la disvastiĝon de klara kompreno pri neceso de uf k pri tio ke ĝi nur eblas sur bazo de komuna serva agado. Ni atingis la starigon de uf ĉe apartaj grupoj desube, kiel ekzemple en Parizo, en Antverpeno, en Vieno k en aliaj urboj. Tamen la rezultoj de la uf-kampanjo estas ankoraŭ malgrandaj. Ni nur staras ĉe la komenco de pli larĝa uf.

Sendube, multe malhelpis al niaj klopodoj la SAT- k kelkaj LEA-gvidantoj, kiuj simple ignoris nian proponon aŭ kontraŭmetis klare provokajn kondiĉojn. Ekzemple la direkcio de SAT, anstataŭ respondi nian inviton, lasis al Lanti, verki artikolon en S-ulo « Pri principoj de unueco », en kiu troviĝis neniuj pozitivaj proponoj, sed nur malnovaj kalumnioj k insultoj kontraŭ la sovetiaj esp-istoj k IPE. La SAT-direkcio uzas ĉiujn eblajn elturniĝojn por malhelpi stariĝon de uf, kiun certe salutas la plimulto de honestaj SAT-anoj. Ĝi postulis redonon de mono, reprenitan de la iama SAT-opozicio, la enlason de siaj kontraŭsovetiaj eldonoj en Sovet-Union, re-aliĝon al SAT, kiel bazon por unueca organizo de la proletaj esp-istoj. Fine ĝi ne deziras uf-on laŭ apartaj landoj, sed nur ĝenerale, do abstrakte kaj ĉiuokaze ne sur bazo de praktika agado ĉar PEK (Proleta Esp-Korespondanto) laŭ Lanti estas propaganda artifiko de Stalin.

La SAT-organizo en Britio (SATEB) respondis, ke ĉar ĝiaj membroj jam estas anoj de grandaj naciaj organizoj neesperantaj, kiuj partoprenas la antifaŝistan agadon ĝi ne vidas neceson por esperantista uf. La tuta esp-ista movado ja ne povas havi tian efikon ol tiuj organizoj

hispana LEA-PUIL deklaris, ke la unueco kvazaŭ estas efektiviĝita en ĝi k ke sekve ŭ uf ne estas necesa.

esploru ĉu tiuj argumentoj validas. Ĉu povas k rajtas pretendi fariĝi la univer-unueca organizo al kiu reiru la tut'a lab. movado, kiel sugestas la sennaciista eks-nto de SAT?

T konsistis el diverstendencaj laboristoj, li estis unuigitaj en SAT en la lastaj jaroj la skismo nur formale, ĉar ne ekzistis na uf. agada bazo de praktika laboro, kiu ilin firme kunligi en tempo kiam skismiĝis nerala laborista movado.

mence la unuecigilo estis la batalo kontraŭ ŭtralismo. Tiam SAT ludis pozitivan rolon, nte laboristajn elementojn el UEA, pro-dant'e klasajn ideojn k eldonante proletan turon. Sed poste kiam necesis fari la prak-servan laboron montriĝis ke mankas firma tala ideologia bazo.

proletaro ne atendas de esperanto novajn n, sed plenumon de ĝia helpa, interliga dariga rolo.

oni povas nomi homojn k ideologiojn, amigas la socialisman demokration surbaze oleta diktaturo en Sovetio kun la grand-lista diktaturo de Musolini aŭ Hitler? Kiuj ntas samigi la sovetan patriotismon t. e. on de proletoj k ĉiuj laboruloj al sia propra mem estrata ŝtato k al la nova, homama, isma kulturo kun la faŝisma naciismo k ismo, kiuj arogas nomi perfido al labor-movado k socialismo la penegojn de la de socialismo por malhelpi la novan mond-on per kontraktoj pri neatako, per eniro o de Nacioj ktp.? Tion diri nur povas aŭ etaj stultuloj, aŭ konsciaj klasaj malamik-aj la sennaciistaj gvidistoj en SAT ne tultaj. Logika fino de tiu sennaciismo estas rioza malamikeco al patrio de la monda aro, al kiu simpatias milionoj da subprem-n ĉiuj terpartoj.

bazo de SAT, sekve, neniu organiza o eblas. Ni kontraŭbatalas ĝian ideologion anizajn principojn.

## ORGANIZA UNUIĜO

tamen neniel signifas ke ni ĝenerale estas ŭ la organiza unueco. Kontraŭe, nia fina stas la starigo de unika universala inter-de proleta esp-istaro, kiu baziĝus unue sur tala internaciismo, due, sur aktiva parto-en la batalo kontraŭ faŝismo, imperial-k militdanĝero, trie, sur organizado de kolektiva laborista interligo per esp-o laboro).

nsistas pri klara proleteca ideologia bazo, kontraŭas al la revolucia laborista mov-ebligas organizadon de unueca praktika

nsistas pri internacia organiza formo, kiu mas al la principoj de la laborista mov-aj permesas kontakti k labori kun labor-rganizoj en ĉiuj landoj.

nsistas pri fak'a servigo de esp-o al la taj amasoj, pri la laboro en la fabrikoj, nlaborulejoj, en farmbienoj, ĉar nur tiu pravigas la utilon de lab. esp-movado.

necesan unuecan ideologion por unueca ziĝo oni certe ne atingos per abstraktaj adoj, sed nur trans la uf-agado, i honeste kaj senartifike proponas al ĉiuj taj esp-organizoj je kondiĉoj kiun akcept-klaskonscia proleto k kiuj estis propon-nia alvoko presita en « Sur Posteno ». Ni deziras komune agadi kie eblas, for-dum tiu agado la malnovajn disput-jn. Nur sur tiu vojo ni proksimiĝos kun aradoj el diversaj organizoj, solidariĝos k . Tion devas kompreni tiuj, kiuj aŭdas re radikalajn frazojn pri senkondiĉa tuja za unueco, kiujn laŭtigas homoj, kiuj ne la unuecon kaj servigon de esperanto al etaro, ĉar senenhavan kaj formalan unu-proletaro ne bezonas.

diroj, de iuj gvidantoj el SATEB en pri nenecesco de speciala uf esp-ista estas alĝustaj kaj malpravaj. Tiuj diroj deven-neagnosko de praktika valoro de esp-o por la antifaŝista batalo. Certe la esp-istaj organizoj neniel povas substitui la taskojn de l' amasaj organizoj pro sia eteco, sed ili povas efike helpi al organizado de internacia amasa interligokorespondado, ili povas diskonigi la esp-sciojn inter la antifaŝistoj k pacemuloj, ili fine povas varbi al la antifaŝista k al antimilit'a fronto multajn neŭtralajn esp-istojn k simpatiantojn k ĝuste por ĉi tio sendube necesas unuigo de ĉiuj lab. esp-istaj fortoj en la lando.

Ni proponu malgraŭ ĝisnuna rifuzo aŭ ne-respondo de mult'aj organizoj al ili la uf-on ankoraŭfoje k senĉese. Ni montru ke IPE plen-umas sian proletan devon honeste. Samtempe ni daŭrigu plej energie starigi la uf-on ankaŭ desube, rekte proponante ĝin al ĉiuj grupoj k distrik'oj de lab. esp-organizoj. La vicaj prol-etaj esp-istoj deziras la uf-on k akceptos ĝin malgraŭ elturniĝo de iuj el iliaj gvidantoj.

La proponaro de IPE-C donas al la komuna laboro taŭgan bazon, pri tio atestas la ehoj venintaj el diversaj landoj. *Vidi la koncernajn partojn de S.P. N-o 31.* Ŝajnas al ni, ke komuna servigo k propagando de esp-o, komuna parto-preno ĉe antifaŝistaj aranĝoj esence devas resti la bazo de uf. Por plifaciligi laŭgrupajn inter-konsentojn, niaj grupoj proponu al samregionaj grupoj starigi kontaktajn k interkonsentigajn komisionojn el reprezentantoj de la koncernaj grupoj en la regiono. Oni konsentu pri ĉesigo de reciprokaj atakoj dum tempo de komuna agado, sed lasu la eblon pri amika opiniinter-ŝanĝo pri la plej gravaj problemoj en la labor-istaj bataloj.

## PRI LA TASKOJ ĈE LA STARIGO DE UF

Kiam ni starigas uf-on ni atentu, ke ĝi ne far-iĝu senprincipa cedo de niaj grupoj al la ideo-logio, kiu direktiĝas kontraŭ la idearo de IPE. Ni ne konsentu al uf senigita de sia proleta praktika enhavo. Ekzemple ni ne faru uf-on sur bazo de nura propagandado de esperanto, kiel komence tio okazis en Antverpeno, sed nepre postulu samtempan PEK-alian servan labor-on. Ni ne toleru uf-on kun grupoj, kiuj faras antisovetan propagandon.

Aliflanke ni ne kondutu kiel sektanoj, starigante al aliaj grupoj tro severajn ideologi-ajn postulojn, ekzemple pri rilato al la burĝa k proleta diktaturo k pri aliaj sociaj demandoj. Al ni sufiĉu la volo de k-doj batali kontraŭ faŝismo k milito k por forigo de la kapitalisma sistemo.

La klopodoj de niaj parizaj k-doj pri komuna agado kiel demonstracio ĉe la tombo de Feder-itoj k la uf-a PEK-servo, organizita de niaj aŭstriaj k-doj devas esti la modelo por nia laboro en ĉiuj landoj.

La unueca, agada fronto de laboristaj esp-istoj en diversaj organizoj certe estas necesa antaŭ ĉio, la lab. esp-istoj montriĝu la plej konscia avan-gardo de la batalo por paco k kontraŭ faŝismo des pli, ke ili havas ne nur tiun kvazaŭ defend-an taskon, sed ankaŭ ĉiam k ĉie atakan — parto-preni la batalon kontraŭ la kapitalisma sociordo entute.

Tamen tiu uf dum la nuna kriza situacio ne sufiĉas. La laborista esp-movado ne atingas an-koraŭ ĉiujn progresemajn k pacamajn esp-istojn. En multaj landoj ĝi estas ankoraŭ sufiĉe mal-forta k 'ial necesas altiri al la antifaŝista k anti-milita agado ĉiujn eblajn aliajn alianculojn. Ni trovas ilin en la neŭtrala movado, pri kiu ni jam menciis en la komenco de nia raporto. Tio plene korespondas al la ideoj de la popola antifaŝista fronto, stariga'a nun en multaj landoj k plej efike dume en Francio.

Necesas eluzi la turniĝon de multaj neŭtralaj organizoj for de faŝismo k reakcio, por vicigi ilin en defendfronton por tiuj res'oj de kulturo k de homrajtoj, kiuj ankoraŭ ekzistas en la ne-plene faŝismiĝintaj landoj, por malhelpi novan hombuĉadon. Ankaŭ la neŭtralaj esp-istoj scias, ke sub faŝista regado esp-o ne povas havi ian estontecon. Ne malpli grave estas altiri indiĝen-ajn neŭtralajn esp-istojn en koloniaj k duon-koloniaj landoj, en Hindoĉinio, Hindio, Hindo-nezio, Afriko ktp., kie la neŭtrala esp-movado rapide progresas k ĝin partoprenas ĉefe sim-patiantaj al naci-liberiga movado intelektuloj, kiuj bonvene rigardas la antiimperialisman ag-adon de proletaj esp-istoj k volonte akceptus ilian helpon k kunlaboron.

IPE ne kaŝas siajn celojn. IPE ne retiras de siaj pozicioj, ĝi nur proponas kunagadon en la afero, kiu koncernas la savon k estontecon de tuta homaro. IPE iom sukcesis en tiu kampo. Nia brava brita sekcio organizis en Sheffield en Aprilo konferencon sub la moto: « Kion ni povas fari kiel esp-istoj por paco k kontraŭ faŝismo », kiun partoprenis la SAT-grupo la neŭtralaj grupoj k individue esp-istoj de la urbo. Eluzante la ligojn de tiuj grupoj kun diversaj organizoj ni sukcesis kunvoki sub esp-ista pa-tronado ne esp-istan konferencon porpacan, kiun partoprenis 92 delegitoj el 48 politikaj, partiaj sindikataj k kooperativaj junulaj k virinaj or-ganizoj. Tiu konferenco pasis tre sukcese k akceptis rezolucion kontraŭ armado k reakcia politiko, kontraŭ la faŝismaj kruelaĵoj k por vasta utiligo de esp-o en antimilita agado. Jen estas brila ekzemplo de tio, kiel ni devas k povas labori en multaj landoj, ne nur unuigante esp-istojn, sed elirante el esp-istaj kadroj al laboro inter la amasoj. Same menciinda estas la klo-podoj de niaj japanaj k-doj helpi al ariĝo de ĉiuj progresemaj esp-istoj sur larĝa fundamento.

La metodoj de kooperado kun neŭtraluloj do evidente devas esti jenaj: komunaj konferencoj laŭ Sheffielda maniero, kreo de komunaj urbaj konsiliĝaj komitatoj, altiro de neŭtralaj esp-istoj al kolekto de antimilita k antifaŝista materialo k verkado por PEK aŭ por specialaj kontraŭ-militaj informservoj, altiro de lingvospertaj neŭ-tralaj esp-istoj al instruado ĉe kursoj en labor-istaj rondoj, komuna propagando de esp-o ĉe antimilitaj k antifaŝistaj aranĝoj, klopodoj por enkonduko de esp-o en popollernejoj ktp. Ĉi tuta laboro estas des pli utila ke inter neŭtralaj esp-istoj ni havas multajn instruistojn, desegn-is'ojn k aliajn spertulojn.

Specialan zorgon ni metu al kooperado kun koloniaj grupoj. Niaj ĉinaj k-doj montras en tiu fako bonan ekzemplon. Ilia lozungo: esp-o por liberigo de Ĉinio, estas tre bona k povas esti aplikata en certaj varioj ankaŭ en aliaj landoj.

Ni parolas pri neŭtralaj grupoj k ne landaj asocioj, ĉar la estraroj de la lastaj ofte estas reakciaj aŭ malhelpitaj de iuj oficialecaj konsi-deroj. Kompreneble, se la situacio permesos ni kooperos ankaŭ kun asocioj landaj.

Kaj nun pri laboristaj esp. organizoj ekster IPE. Nia fina celo estas kiel ni jam deklaris, aligi ĉiujn lab. esp-organizojn en unikan klas-batalan internacion, kiu servigos esp-on al la proleta batalo, kies transira ŝtupo es'as uf de antifaŝis'a k antimilita agado. Sekve niaj rilatoj al la k-doj-membroj en aliaj organizoj, kiel al niaj klasfratoj, kunbatalantoj aŭ kunbatalontoj nur povas esti plej k-decaj k simpatiaj. Tute alian rilaton ni havas al neproleta ideologio, predikata k disvastigata de iuj gvidantoj el tiuj organizoj, kiuj faras ĉion por malsukcesigi la uf-on, aŭ al organizoj, kiel la sennaciista k « Bolenfrasat », kiuj kontraŭbatalas malkaŝe Sovetunion k klopodas por nova skismigo de laborista movado per s'arigo de nova kvara internacio. Tiujn ni senkompate kontraŭbatalos kiel malamikojn de laborista movado.

Nia rilato al SAT. Nek al la ideologiaj prin-cipoj, propagandataj de SAT-gvidantoj, nek al organizmaniero de SAT. IPE povas simpatie rilati. Tamen ni deziras kamarade kunlabori kun ĉiuj klasfidelaj k-doj en SAT. La SAT-gvidantoj diras, ke IPE nur deziras laŭlandan uf-an agadon, dum SAT estas sennacieca or-ganizo kun individua membreco k ke sekve ne eblas uf kun IPE, sed tio estas tro malkara el-turniĝo, kiu reliefe montras la malemon al ĉiu serva laboro, al ĉiutagaj bataloj de laboristaro en diversaj landoj.

Pri « sennacieco » ni ne diskutu, sed nur konstatu, ke la tiel nomata « sennacieca organ-izo » kreis naciajn sekcietojn en Danio, Britio k Usono, k ĝi faris tre vastan organizan, financan, aliancon kun la naciaj LEA-oj en Svedio, Hol-lando, Ĉekoslovakio k kelkaj aliaj k ke fine en diversaj urboj ekzistas grupoj sub nomo de SAT-rondoj, kiuj tre bone kapablas se nur estas

dezíro labori uf-e tute ĝuste konkrete k laŭlande. Al ili ni nin turnas unuavice. Tio neniel signifas, ke ni ne deziras ankaŭ interkonsenton kun SAT entute. Kontraŭe, ni opinias, ke SAT povus utili al uf-agado se ĝi disponigus siajn gazetojn k siajn eldonaĵojn al propagando de uf, de PEK k de antifaŝista k antimilita agado ĝenerale. Ĝi devos rekomendi al alianciĝintaj LEA-oj aktive partopreni tiun agadon komune kun IPE. Plue ni postulas la ĉesigon de atakoj kontraŭ Sovetio, kontraŭ IPE k SEU, la ĉesigon de pergazeta sub'teno al klopodoj de kontraŭsovetiaj grupoj en SAT, en kio ni plene interkonsentas kun la multaj sovetamikoj inter la SAT-anoj.

Niaj rilatoj kun ISE certe estos pli facilaj ĉar ĝia ideologio estas pli parenca al proleta internaciismo, ĉar en multaj landoj la revoluciaj laboristoj sukcese uf-as kun socialistaj kiel en Francio, Germanio, Aŭstrio k aliaj landoj. Tiun fak'on ni devas eluzi por devigi la hezitantajn gvidantojn de grupaj k landaj organizoj, kiel ekz. ĉe ESFIO en Francio respondi jese al niaj uf-proponoj.

Tiucele ni antaŭ ĉio nepre devas rebati la manovrojn faratajn de iuj el gvidantoj de ISE. Por pruvi, ke IPE kvazaŭ estas malamika al socialistaj laboristoj k ne allasas ilin aliĝi al siaj vicoj, ĝi citas par'on el la Berlina deklaracio de IPE, farita ĉe la unua kongreso en 1932, kiu tekstas: « IPE kontraŭbatalas la oportunisman sennaciismon k ankaŭ reformisman ideologion de socialdemokratio, subtenan'aj la imperialismajn rabadojn k militojn, kiuj plenumas la taskon deteni la laboristojn de la klasbatalo k malhelpas la efektivigon de ruĝa uf ». Sed, k-doj, ĉu nun post la sangaj sper'oj en Germanio, post Aŭstria tragedio, post la Hispana reakcio la socialistaj laboristoj ankoraŭ plene sekvas al tiu ideologio? Ni kontente povas konstati, ke ne. La ideoj pri revolucia klasbatalo, pri proleta diktaturo, la simpatio al Sove'unio ĉiam pli kreskas inter ili. Tial ni trankvile povas deklari ke nuntempe tiu deklaracio, koncerne al la ideologio de socialdemokratio ne plu es'as aktuala k ni esperas, ke nun ne plu ekzistas iaj formalaj malhelpoj al starigo de vigla unueca agado.

Ekzistas ankoraŭ unu laborista esp-organizo interlanda, pri kiu ni devas fiksi nian rilaton, nome al t. n. IPK. (Internacia Proleta Kooperado) kiu jam okupis nin ĉe la konferenco en Lille. Tiu movado, kiu estiĝis por vigligi la movadon en la limregionoj de Germanio, Holando k Belgio surbaze de limrenkon'iĝoj k de uf-aj elpaŝoj, kiujn partoprenis ankaŭ individue neŭtralaj esp-istoj faris en la pasintaj jaroj utilan laboron. Ĝi helpis vigligi la proletan esp-movadon de FEP en Norda Francio, ĝi helpis al starigo de movado en Flandrio, ĝi helpis, fine, la ligojn kun niaj germanaj k-doj. Tamen unu el ĝiaj ĉefaj mankoj estis, ke ĝi limiĝis je pura propagando de esp-o, plene neglektis la servan PEK-laboron k ne edukis siajn membrojn al klaraj klaskonsciaj pozicioj. En sia propagando, se juĝi laŭ la ĝia estinta organo «Fajrero», ĝi allasis multajn politikajn fuŝaĵojn k neŭtralismon. Ankaŭ laŭ organizo ĝi malhelpis en Nederlando al la laboro de la Unuiga Komitato, ĝi fondis la entreprenon la t. n. « Int. Esperant. Helpo », kiu nur povis miskreditigi laboristan esp-movadon ĉe laboristaj organizoj k nenion entreprenis por instigi siajn membrojn aliĝi al la landaj LEA-oj k UK-oj. Tio montras ankoraŭfoje, ke IPK pretendas resti memstara organizo apud la jam ekzistantaj internaciaj proletaj esp-organizoj. Ĝi pretendas la rolon de peranto al uf inter la landaj organizoj k rolon de maskita laboranto inter la neŭtraluloj. Ĉi tiuj tezoj tamen neniel estas defendeblaj. En la regionoj, kie laboris IPK ekzistas jam aktivaj esp-lab-organizoj, kiuj nun transiras al uf tute sen helpo de IPK, kiu nun konsis'as preskaŭ nur el sia komitato. Sekve ĝia plua ekzisto estas tute senutila. IPE ne bezonas perantojn por uf. IPE ne bezonas specialajn komita'ojn alinomajn por labori inter neŭtralaj esp-istoj, tion ĝi faras mem k senkaŝe sur antifaŝista k antimilita bazo. La plua ekzis'ado de IPK nur povas deteni influantaj de ĝi k-dojn aliĝi al ni k tiel malhelpas al la plua progreso de lab-esp movado en la koncernaj regionoj. Tial IPE plene agnoskante la valoran laboron faritan de IPK alvokas ĉiujn ĝiajn anojn aliĝi al la LEA-oj k UK-oj, viciĝi en la PEK-laboron k la Komitaton mem ĉesigi sian pluan ekziston por la bono de la movado.

Nia rilato al malfortaj lab-esp-organizoj aŭ tiuj en teroraj landoj, en kiuj ekzistas multaj simpatioj por IPE devas esti speciale atenta k helpema. Tio koncernas la Norvegan LEA-on, la Hispanan, la Polan, Latvan k Estonan k aliajn sendepende de ilia orientiĝo, ĉar nia celo estas konservi k disvolvigi la proletan esp-movadon en tiuj landoj.

Nia rilato al la profesiaj esp-organizoj, kiel al poŝtistoj, fervojistoj, edukistoj, verkis'oj ktp same estas gvidata de nia deziro starigi kun ili kooperadon uf-an sur bazo de PEK-laboro k propagando en la koncernaj profesiaj rondoj. Ni altiru ilin al kunlaboro en niaj organoj, ni mem kunlaboru en iliaj gazetoj k sub'enu al aliĝon de niaj membroj al iliaj organizoj.

Ni kooperos ne nur kun la proletaj profesiaj organizoj, sed ankaŭ kun ĉiuj neŭtralaj, kiuj deziras kunlabori kun ni sur la kultura k antimilita kampo.

Kaj nun fine pri nia rilato al neesp-istaj lab-organizaĵoj. IPE estas eksterpartia k tendenceneŭtrala organizo, kiu akceptas en siajn vicojn diverstendencajn laboristojn klasbatalajn. Tamen ni diferenciĝas de aliaj lab-esp-organizoj per nia praktika agado, farata inter la laboris'aj amasoj. Estas do kompreneble, ke tiun amasan laboron ni nur kapablas fari kontakte kun amasaj organizoj de proletaro unuavice kun la kulturaj k helpaj, kiel ekz. kun la ILH, laboristaj sportuloj, sindikatoj, teatristoj, senlaborulaj komitatoj, laborista junularo, sovet-amikoj ktp. El tio sekvas, ke ni partoprenas ĉiujn uf-ajn, antimilitajn k antifaŝistajn kampanjojn de la grandaj laboristaj organizoj k partoprenos en la batalo kontraŭ ĉiuj malamikoj k sabotantoj de la uf k de la antifaŝista batalo.

IPE ne staras ekster la proletaj bataloj k ekster la ĝenerala antifaŝista k antimilita fronto. Kontraŭe, ĝi estas par'o de ĝi, ĝi estas pioniro de ĝi en la proleta esp-movado. Por pruvi tion ni montru ekzemplon de konsekvenco al la tuta esp-ista movado. IPE ne hezitos aliĝi kun ĉiuj siaj sekcioj kaj UK-oj al la Mondkomitato kontraŭ faŝismo k milito por tiel ankaŭ en internacia skalo servigi esperanton k la forton de sia membraro al tiu movado, al defendo de Sovetio k al la afero de l' paco.

Vivu la uf de proletaj esp-istoj!

Vivu la kooperado de ĉiuj progresemaj esp-istoj kontraŭ faŝismo k milito! (Aplaŭdoj.)

Vivu Internacio de Proleta Esperantistaro!

K-do TURNER: Ni havu interrompon dum dek minu'oj, post kiam ni povas demandi k diskuti.

## ĈEFA DISKUTPUNKTO : LA UF !

K-do TURNER (Britio): Ĉu la punkto pri uf kun diversaj fakorganizoj havas rilaton al IAREV k TEPS?

K-do RESPE: Ne estas facile doni klarigon pri raporto kiun oni ne mem verkis. Tiuj fakorganizoj kiel organizoj ne havas ideologian celon kvankam la individuoj povas havi ĝin k ofte havas. Sed ili konsistas el laboruloj, kiujn ni devas tiri al ni.

K-do SCHOEN (Belgio): Ĉu IPE-ano devas es'is ano de sia metia sindikato? Laŭ mia opinio oni ne povas paroli pri uf, se oni ne estas ano de sindikato.

K-do MALFERE (Francio): IPE kiel organizo ne povas devigi siajn membrojn. Tio estas persona afero. Estas unu afero deziri uf-on k estas alia afero esti ano de sindikato.

K-do TURNER (Britio): Internacia organizo ne povas devigi ĉiun membron sindika'aniĝi ĉar en diversaj lokoj estas diversaj kondiĉoj.

K-do MORO (Belgio): Ni ne povas devigi, ĉar alie ni ne estus plu kultura organizo sed suborganizo de sindikato aŭ eble de partio, k ne utilas plu diskuti pri la problemo.

K-do RESPE: Ni ne povas diskuti du horojn pri tiu afero ĉar nia tasko estas diskuti la problemon de uf. Ni ne povas devigi ĉiun aniĝi al sindikato kvankam estus dezirinde, se ĉiu estus sindikatano.

K-do TURNER (Britio): La raporto de IPE-Sekretario iom abstrak'e tuŝis la demandon pri uf. Ofte oni multe teorias pri tiu temo sed praktikon oni ofte ignoras k es'as necese montri uf-on per agado. La Sheffielda uf-sukceso ebliĝis, ĉar ĝi es'as unu el la plej bonaj PEK-filioj k laboris dum monatoj eĉ jaroj inter ne-esp-istoj. Mi aŭdis multon pri la sukceso de la Franca uf, sed ne aŭdis multe pri ilia PEK-laboro. Mi ŝatus aŭdi kiel ili atingis tion sen antaŭa firma bazo. Uf ne nur es'as afero de Esp-istoj. Nur per aplikado de PEK-laboro oni povas krei tian influon ĉe la amasoj.

K-do MALFERE (Francio): PEK-laboro estas la sola ekzistrajto de laboristaj esp-istoj. Grupoj, kiuj uzas esp-on nur por persona korespondado ne estas utilaj al la laborista klaso. Esp-is'oj devas servi ne-esp-istojn. Ĉefe en Parizo fortas la uf inter laboristaj esp-istoj. Ni diskutis kun FEO-anoj, kian taskon havas proletaj esp-istoj. Ni devigas ĉiun k-don, kiu lernis esp-on uzi la lingvon por la klasbatalo. Se membro de la Ruĝa Helpo lernis esp-on ni devigas lin ne forlasi pro esp-o Ruĝan Helpon sed li devas res'i en ĝi kaj uzi esp-on por la utilo de Ruĝa Helpo. Antaŭ Oktobro aperos la unua unueca bulteno. Se ni ansta'aŭas malnovan vorton kiel ekzemple PEK k parolas pri gazetservo, tio povas of'e helpi al kreo de uf.

K-do CROUTEUX (Belgio): La raporto enhavas gravajn erarojn pri IPK. IPK faris utilan laboron k sen ĝi ni ne estus tiom fortaj en nia regiono kiom ni fakte es'as. Ankaŭ k-do Van Dooren, kiu vizitis nian renkontiĝon en Visé, diris ke li estis tre kontenta pri ĝia revolucia spirito. Ni havas kursojn en tridek socialdemokrataj popoldomoj k tial ni ne povas oficiale rilati kun IPE. Krome FEO provas detrui nin.

K-do MORO (Belgio): Estas hontinda afero, ke oni riproĉas al IPK kiel blufan entreprenon. Ĉu estas blufo — nia laborista solidareco? Nur estas blufo, kiam oni ne praktike helpas. Ni helpis 52 familiojn. Nur IPK tiel helpis. En la renkontiĝoj ĉiam okazis frakciaj fakkunsidoj por IPE, por komunista frakcio k pri PEK. Renkontiĝoj sukcesis forigi la sennaciisman ideologion de Satanoj. Se oni atendas gvidadon de IPE-Centro el Moskvo aŭ Leningrad oni povas atendi 6 monatojn. Antaŭ tri jaroj GLEA, Rejnlando, Limburgo k Valonio faris uf-on kontraŭ faŝismo k milito. Kial oni nomas tion neŭtrala? Kiel Leningrad povas pli bone scii pri tio ol germanaj k-doj. Ĝis oni ne donas al ni pli bonan ekzemplon ni ne akceptas kritikon.

K-dino VAN DUIN (Nederlando): Bedaŭrinde en Nederlando oni ankoraŭ ne havas dezirindan sukceson pri uf. Tio estas facile komprenebla, ĉar ĉe ni la partioj ne kiel en Francio k aliaj landoj sukcesis starigi uf-on. Ni devas krei uf-on de sube sur bazo de PEK-laboro. Estas jam federaciaj grupoj, kun kiuj ni havas bonan kontakton k kun kiuj ni jam laboras. Mi deziras havi sugestojn k direktivojn kiel estas eble pli akceli uf-on k aranĝi kolektivan PEK-laboron.

K-do TANGVAAL (Svedio): Mi ne estas ano de UK. Mia grupo estas en Malmö. En Skandia regiono ni sukcesis en 7 postenoj de la estraro havi 4 IPE-anojn. Ni havas proponon por PEK-laboro k prezentis al SLEA konferenco. Dependas de ĝia decido.

K-do CARLSEN (Danio): Ne estas mul'e por raporti. Niaj provoj rilate uf-on multloke fiaskis. Dum Pentekosto oni fondis LEA-on. Ni sendis delegiton, sed oni atakis revoluciajn esp-istojn k diris, ke IPE estas komunista. En nia urbo komunistoj k socialistoj bone kunlaboras. La klubo al kiu mi apartenas estas ankaŭ ano de LEA. Oni sendis min ĉi tien por akiri praktikon pri uf-laboro.

K-do VAN DOOREN (Belgio): La laboro uf-a estas triflanka en nia regiono. Ni devas rilati al FEO al burĝa grupo, kiu estas tre forta k krome ni devas rilati al AEOP. Ni jam interrilatas pri uf kun FEO. Ankaŭ ĉe burĝoj ni havas certan sukceson. Ni faris malkaŝe laboron por PEK k varbis por SP. En unu burĝa grupo ni havas gravan sukceson. Ĝi faras PEK-laboron.

i AEOP oni ŝajne ne bone komprenis. Mi zitis AEOP k mi devas diri ke ĝi ne estas eŭtrala. Tamen ĝi ne rilatas ĝuste al IPE. La vidaĵn membrojn de AEOP ni sukcesis aliĝi IPE k ilia bulteno nun ankaŭ presas pli EK-artikolojn. Krome en sia regiono ili vendas ekzemplerojn de SP. La orkestro de AEOP das dum la Kongreso de IPE. Tio montras ke tre simpatias al ni. Ni do devas esti singardaj i AEOP.

K-do AMASANTI (Britio): Malgraŭ ke Shefeld sukcesis pri uf, ni ne sukcesas en Suda itio. Ni havis kunvenon sed ne povis trovi nkretan ideon por unueca laboro. Mi devas nsenti, ke nur per PEK ni povas starigi nian uecan laboron.

K-do RESPE: La k-doj klare parolis pri ufado. Ili komprenas, ke ĝi estas nuntempe nia fa tasko. En Lille ankoraŭ ekzistis diversaj inioj, sed nun ĉiu k-do klare komprenas tiun oblemon. Ni bone memoru la hodiaŭ diritajn rtojn por morgaŭ kiam venos la k-doj de SAT. Belgaj k-doj ankoraŭ ne bone komprenas, nia ĉefa organizo estas IPE. Mi protestas ergie kontraŭ la intervoko de Moro, kiu diris en la raporto estas mensogoj. La raporto klare as ke IPK estis bona dum unua tempo de sia zisto. Sed ankaŭ SAT havis periodon, dum ĝi estis bona. Nun IPK faras laboron parte itikindan. La IPE-anoj, kiuj estas en IPK vas unue interrilati kun Unuiga Komitato. Ili boru unuavice laŭ la direktivoj de IPE. Estas ange, ke ili havas du gazetojn, kiuj ambaŭ rtas esti IPE-emaj. Mi volas diri, ke la unua ko, kiun ni havas rilate al uf-agado estas unue igi nian propran movadon, por povi des pli ne due kunlabori kun aliaj organizoj.

## RIA LABORKUNSIDO, 11.8.35. 9.30 h.

*Prezidas k-do SMITH, kiu iegINte kelkajn utleterojn transdonas parolrajton al k-do RES- por legado de la*

# ORGANIZA RAPORTO DE LA IPE-CENTRO

Gekamaradoj!

Post kiam la ideologiaj demandoj estas klaraj, organiza laboro en la movado decidas la pluan greson. Eĉ pli, nenion oni povus komenci per a ideologio sen bona organizado.

Tri jaroj post nia fondkongreso ni troviĝas en alia situacio. Ĉirkaŭ duono el niaj sekcioj grupoj laboras en la faŝismaj landoj. Sed lgraŭ la teroro k persekutoj ili sukcesas reigi la organizajn ligojn, eltrovi novajn labormodojn, kiuj permesas la organizadon de la va. laboro, la PEK-laboro, kiel ekzemple en rmanio, Japanio, Ĉinio, Bulgario k en nia plej a k glora sekcio — en Aŭstrio. Niaj sekcioj UK-oj en la demokrataj landoj kreskis laŭ mbraro k ankaŭ laŭ kvalito de sia PEKoro. Kreskis ankaŭ ilia morala influo inter oristaj organizoj. Interne multaj el ili tiel solis, ke iu nova bato de l'faŝismo ne sukcesus pi la internaciajn rilatojn k ŝanceli ilian oron en landa skalo.

n la pasintaj jaroj oni multe diskutis, ĉu la A-oj pli multe atentu la servan PEK-laboron la propagandan-varban, ĉu ni povas k devas ĝi amasorganizo aŭ ne. Tiaj demandoj restis ualaj ankaŭ nun. Komence de nia ekzisto ni s ege k akre batali por agnosko de l'neceso avo de praktika serva laboro. Post la fondiĝo IPE neniu k-do preskaŭ malagnoskis tiun eson aŭ ne komprenis ĝian valoron, sed oski ne jam signifas labori k tiel ni multe k te devis por tio batali. Tio ne estis facila. rememoru pri tio, ke nia franca sekcio suk- iom ordigi sian PEK-laboron nur en nta jaro! Nuntempe en preskaŭ ĉiuj sekcioj raktika laboro estas konsiderata la plej grava o. Ĉu ne estas karakterize, ke novaj sekcioj K-oj nun ofte evoluas el la PEK-filioj, kiuj kas unue sur la akirota teritorio kiel ekle en Aŭstrio, Islando, Hindo-Ĉinio?

men la PEK-laboro sola ne sufiĉas por progresigi k firmigi nian movadon. La propagando, la varbado k edukado de novaj membroj estas ne malpli gravaj ol PEK. Ni devas konfesi, ke en kelkaj IPE-organizoj la PEK-ado tiel okupis la horizonton, ke oni serioze komencis peki kontraŭ la organiza laboro. PEK k esp-o estas armiloj, sed kiel progresi, se mankas la soldatoj? Jam nun ni povas konstati, ke en kelkaj landoj, ekz. Britio, niaj k-doj simple ne kapablas plenumi la tutan servan k PEK-laboron, kiu kreskas kun ĉiu tago aŭ ne povas pli disvastigi la kolektivan korespondadon, ĉar mankas k-doj, kiuj priservu la amasegon da diversaj organizoj k laborejoj. Malgraŭ la kritiko de Lille-a konferenco la membroŝato de BLEA nur kreskis je 44 %. Same oni povus kritiki kelkajn grupojn de SEU, kiuj pro manko de bona propaganda k organiza laboro ne kreskis, sed eĉ iomete malkreskis, kiel ekzemple la Leningrada grupo, kiu faris bonegan PEK-laboron, organizis pli ol 80 elpaŝojn de eksterlandaj laboristaj esp-istoj-gastoj en diversaj fabrikoj k kluboj, sed preskaŭ faris nenion por eluzi la efikojn de tiuj elpaŝoj por fondi novajn kursojn k grupojn. Antaŭ unu jaro en la Simferopola grupo, kiu apartenas al la sufiĉe konata Krimea organizo de SEU, oni tiel PEK-iĝis, ke en la laboristaj kluboj mem oni forigis ĉiujn prik porespe:antan afiŝojn ĝis oni ricevis riproĉon de CKSEU. Aperis novaj malsanuloj, kiuj timas uzi la vorton esp-o, por kvazaŭ ne kompromitiĝi. Sed estu certaj, ke per tiu malkuraĝo k falsa kompreno de PEK-taskoj ni nur vekas malŝaton ĉe niaj kontraŭuloj k neniel progresigas la movadon. La esp-propagando devas ĉie k nepre akompani aŭ sekvi al sukcesa PEK-laboro. Niaj sekcioj k UK-oj devas eldoni pli multajn k pli trafajn flugfoliojn k broŝurojn, fari pli da propagandaj vesperoj k pli da kursoj, ol ĝis nun.

Ĉu ni povas fariĝi amasorganizo? Certe ni povas, se la uzo de esp-o estos rekomendata de la grandaj laboristaj internaciaj organizoj. Ni tiam certe povos atingi en ĉiu lando dek ĝis cent mil da laboristoj, kiuj lernos nian lingvon. Tio estas nia fina, organiza celo. Nuntempe tio ankoraŭ ne estas reala, ĉar la plimulto de laboristoj ne estas facile movebla aliĝi al nia movado, kiu ne estas speciale rekomendata, postulas certan penon k forprenos, kiel ŝajnas al ili tro da valora tempo, kiun ili uzas por sekciaj k politikaj celoj. Nuntempe ni pretendas esti ne amasorganizo, sed nur multnombra movado, kiu helpas al la amasaj organizoj. Nia forto estas ne en la amaso, sed en nia internacia k interloka disvastiĝo — po malmultaj k-doj, sed en la ĉiuj ĉefaj k la plej foraj lokoj.

Alia demando estas, kiun oni varbu unue? Ĉu klaskonsciajn laboristojn, anojn de diversaj klasbatalaj organizoj, aŭ neklaskonsciajn? La klaskonsciajn k-dojn ni bezonas antaŭ ĉio por levi la PEK-laboron al la necesa ideologia alto k por sekuri la ĝeneralan orientiĝon de nia movado. Tiuj k-doj estas momente pli bezonataj al ni, ĉar ni sentas mankon ne nur pri ideologikleraj funkciuloj, sed ankaŭ pri spertaj organizantoj. Sekve ni turnu nian atenton speciale sur tiujn rondojn. Tio neniel signifas, ke ni forgesu pri varbo de nekonsciaj k-doj, ĉar estas nia morala devo eduki novajn klasbatalantojn k ankaŭ ĉar ili estas pli facile varbeblaj.

Por plibonigi nian laboron pri kontingentoj ni devas zorgi ne nur pri varbado de konvinkitaj esp-emuloj, sed ankaŭ de niaj simpatiantoj, kies nombro estas pli granda. Tiuj simpatiantoj aperas ofte post sukcesaj aranĝoj k PEK-laboro. Inter ili estas multaj klaskonsciaj laboristoj, kiuj pro tiuj kaŭzoj ne povas lerni la lingvon k partopreni pli aktive nian organizon, sed kiuj subtenus k helpus la movadon ne nur mone, sed ankaŭ ĉe konkretaj laboroj. Tio estas pli, ol la tiel nomataj subtenantaj membroj, kiuj ekzistas en malgranda kvanto en diversaj sekcioj de IPE. En la sovetia sekcio tiuj membroj, la tiel nomataj amikoj de la internacia laborista korespondado k de esp-o, ludas gravan rolon k konsistigas pli ol duonon de la membraro.

Ĉiu loka komitato de SEU organizas ĉe fabrikoj, kluboj, oficejoj grupojn de amikoj. Tiuj grupoj helpas en la organizado de internacia korespondado en sia laborejo, al diversaj internaciaj aranĝoj, vesperoj, al propagando de esp-utiligo, helpas al varbado al kursoj ktp. Gvidata tiu grupo estas de SEU-ĉelo, kiu troviĝas en ĝi k konsistas el aktivaj esp-istoj. Tiuj grupoj prezentas la plej bonajn rezervojn por la baza membraro de SEU. La kotizoj estas multe pli malaltaj, ol la ĉefa membrokotizo k tio permesas amasan aliĝon.

Ĉi tiun sperton sen ia dubo oni povus transporti al aliaj landoj kun granda utilo.

# STATO EN LA LANDOJ

*Pri Francio k Britio* ni ne multe parolos. La ĉeestantaj delegitoj prefere mem raportu pri siaj sukcesoj. Ni nur konstatu, ke la movado en Francio disvolviĝas kontentige, ni kreskis je 50 %, en Britio malpli, kie la membraro nur atingis 250. En Francio ni rimarkas aktivecon en pli multaj distriktoj, pli bonan partoprenon en la aranĝoj de la laboristaro, pli bonan propagandan laboron k pli bonan eldonagadon (eldono de novaj lernolibroj k flugfolioj). Tamen la PEK-laboro ankoraŭ penetris nur en malmultajn grupojn.

En BLEA kontraŭe la propaganda k kursa laboro, la aktiveco en la distriktoj ne estas sufiĉaj. Oni devas nur turni la ĉefatenton al preparoj de novaj kontingentoj.

Se en Eŭropo kaj Azio la movado estas pli malpli vigla, oni tion ne povas konstati pri Ameriko, nome pri nia Nordamerika sekcio LEANA. Ĝi ekzistas jam tri jarojn, sed preskaŭ ne montras progreson. Estas farata nenia PEK-laboro, nenia organiza laboro. Pro tio la membroj tute pasiviĝis k vegetas individue. Tiu stato estas sufiĉe stranga k kvazaŭ nekomprenebla. USONO k Kanado ja formas tiel nomatan anglalingvan kontinenton, sed tio ne estas kaŭzo por la malforteco de nia movado. Komparu Aŭstralion k Brition. Ni asertas akcente, ke la kaŭzoj de nia stagno tute ne estas objektivaj, sed subjektivaj. Se k-do Bonesper, la sekretario de LEANA, povas skribi, ke stato nur povus aliiĝi, se IPE-C sendus al USONO 5 aŭ 6 organizantojn por helpado, ni konkludas, ke la gvidantaj k-doj ne komprenas ĝuste niajn taskojn k simple ne kapablas organizi la laboron.

Jam antaŭ du jaroj ni postulis, ke la k-doj nepre eldonu informilon, se eĉ nur dupaĝan, por interkontaktigi la membrojn en diversaj lokoj. Ĝis nun la k-doj en Nov-Jorko pretendas, ke tio ne eblas. Je ilia loko ni devus honti, kiam ni scias sub kiaj kondiĉoj niaj k-doj en la teroraj landoj kapablas eldoni multpaĝajn informilojn k PEK-bultenojn. Anstataŭ iri al la laboristaj amasorganizoj k al la kulturaj, kiuj certe helpus pretigi tiun malfeliĉan informilon k eĉ PEK-bultenon, oni atendas ĝis la helpantoj k la novaj membroj sin mem anoncas.

Ni siatempe proponis al la Amerikaj k-doj eliri el nuraj rondoj de hungaraj elmigrintoj ankaŭ al aliaj nacioj k ĉefe al amerikanoj, sed ŝajne la iama raporto pri sukceso de anglaj kursoj ne tute respondis al la faktoj. De kie oni povas havi membrojn k kreski, se oni ne aranĝas en laboristaj organizoj kursojn, se oni ne emas ligon kun la k-doj el la provinco k ne donas al ili helpon. La PEK-laboron oni certe ja povus organizi en Nov-Jorko k eble en Detroit, kie ni antaŭe havis tre aktivajn korespondantojn por Internaciisto k PEK-internacia. Neniu zorgis por doni al niaj k-doj en diversaj lokoj la ĝustan komprenon pri la taskoj de PEK. Tiun staton necesas nepre aliigi ĉar USONO devas fariĝi perejo al kreo de nia movado en ĉiuj Sud- k Mezamerikaj landoj.

Kontraŭe al USONO nia laboro en *Aŭstralio* montras progreson. Ni havas kursojn ĉe la sindikatoj, aperas bulteno, estas starigita ligo kun Nov-Zelando.

*Pri la laboro de unuigaj Komitatoj.* — La PEK-laboro nun preskaŭ ĉie funkcias, kvankam ĝi ofte nur limiĝas je eldono de PEK-bulteno aŭ de PEK-paĝoj.

Pli malbone statas la organiza laboro. Ĝis antaŭ unu jaro ni devis multe batali kontraŭ la emoj ĉe la k-doj prefere tuj fondi novan paralelan LEA-on, ol fari persistan, sed fruktodonan laboron inter la membraro de l'malnova. Tipa ekzemplo por tio estas la Nederlanda UK.

En la lastaj jaroj ni vidas preskaŭ ĉie vigliĝon

k pliboniĝon. En *Svedio* post longa dormado, dank' al la sindona laboro de niaj k-doj el Malmö, komenciĝis aktiva opozicia k kleriga laboro interne de SLEA. Kiom grava estas tiu laboro en Svedio k Nederlando oni komprenas, se oni rememoras, ke SLEA k NFLE estas la ĉefaj ideologiaj k materiaj subtenantoj de SAT. Ni citu la faktojn pri elekto de la suddistrikta estraro de SLEA lastjare, kiu nun konsistas el aktivaj IPE-anoj k la inviton de la nunjara SLEA-kongreso al Malmö, kie ekzistas nia plej forta IPE-grupo, la sukceson ĉe la centra partia k junulara gazetoj, kiuj presigas regule esp-rubrikon, same kiel en Hollando.

En Nederlando ni vidas ioman aktiviĝon en la opozicia laboro, pli viglan partoprenon en la vivo de la asocio. Tamen ni ĝis nun nenion aŭdis pri NUK-aktiveco ĉe la lasta NFLE-kongreso en Groningen. Kion NUK mem proponis, tion ni ŝatus aŭdi ĉi tie. La ligoj kun IPE-C estas sufiĉe malbonaj. Al la laboro cetere multe malhelpis personaj malpacoj k taktikaj devioj de personoj, kiuj celis rompi nian opozician laboron k daŭrigi la kvereladon.

Nia situacio en landoj, kie la LEA estas gvidata de niaj k-doj, sed la membraro ne jam plene estas varbita al la IPE-ideoj, ne estas kontentiga. Tiel ekzemple en *Norvegio* la laboro de UK laŭ propra konfeso en iu n-ro de ilia bulteno, aperinta komence de ĉi-jaro, preskaŭ tute ekdormis. La ligoj kun la provinco estas perditaj, PEK-laboro ne estas farata k fine en la organo de NLEA aperas neniu kleriga materialo pri IPE. Jen ni havas tipan ekzemplon de miopo. La k-doj pensas, ke se ili sidas en la estraro, la membroj per si mem fariĝas simpatiantoj al IPE. Sed anstataŭ tio ni asertas ke niaj k-doj mem en tiuj organizoj komencas oportunistiĝi k foriri de la IPE-pozicioj.

Specifa situacio estas en landoj, kie ekzistas kelkaj LEA-oj aŭ lab-esp. grupoj, kiel en *Svisio, Danio, Belgio*. En tiuj landoj ni havas UK-ojn. Ilia celo estas per uf-laboro akiri la influon sur la plimulton de laboristaj esp-istaj grupoj, por poste fondi landan IPE-sekcion. Ankaŭ ĉi tie tre gravas lerta taktiko, por ne atingi pluan splitiĝon de la movado anstataŭ la unueciĝo. Nia svisia UK tiurilate laboris tre bone. Ĉe la lasta konferenco de lab-esp-grupoj de Svisio en Biel ĝi elpaŝis kun pledo por PEK, por aliĝo al IPE k principe subtenis la proponon de estraro de ne IPE-a lab-esp-grupo en Ĝenevo pri fondo de svisa LEA. Kvankam tiu propono ne estis akceptita, tamen ĝi gajnis multajn simpatiantojn k la decido permesi libervolan aliĝon al IPE estas grava morala sukceso. La svisiaj k-doj havas grupojn en Bern, en Basel k ĉelon en Ĝenevo. SvUK estas la unua UK, kiu aranĝis sukcesan socialisman konkuradon kun aliaj, nome kun NUK.

Niajn *belgajn* k-dojn ni povas gratuli pro ilia aktiveco, plej bona pruvo pri ĝi estas la jen okazanta kongreso. Tuj post la SAT-skismo k antaŭ ĝi ni havis en Bruselo tre aktivan grupon k PEK-filion. Sed poste ĝi tute malaktiviĝis ĝis la nova antverpena grupo renovigis la movadon. Tamen oni faris kelkajn erarojn. Unue oni ne devus fondi sekcion sed UK-on. Tio nun jam estas korektita. Due la nesufiĉa komenca kontakto k laboro kun la « Internacia Proleta Kooperado », LEA k socialistema AEOP. Trie — la bazigo de uf kun NFLE-grupo en Antverpeno nur sur propagando de esp-o k ne sur la PEK-laboro. Ni esperas, ke niaj belgaj k-doj dum sia nuna speciala konferenco pritraktos ĉiujn aferojn k preparos la bazon por la uf inter si, AEOP k FEO en Belgio.

En *Danio* nia movado evidente stagnas ĉefe pro personaj kvereloj k malĝusta kompreno de l'IPE-taskoj. La tuta IPE-movado limiĝis je unu urbo — Odense, kie troviĝas du malpacantaj IPE-grupoj: la IPE-frakcio en la laborista grupo Unueco k la eksiĝinta el la Unueco klasbatala grupo « Antaŭen ĝis la celo ». Antaŭ unu jaro fondiĝis kun partopreno de ambaŭ grupoj UK pro nia insisto. Sed ĝis nun la aferoj ne normaliĝis k anstataŭ praktika laboro oni okupiĝas pri senfruktaj disputoj, kio estas pli klasbatala.

*Pri la laboro en teroraj landoj.* — Kiel ni jam menciis, la unua reiro en membrokvanto pro atako de faŝismo estas haltigita. Niaj organizoj komencas denove kreski. En Britio regule aperas germana PEK-bulteno. Bedaŭrinde ni preskaŭ nenion scias pri la organiza laboro de GLEA.

*Aŭstrio.* — Ĉi tie troviĝas nia plej juna k brava sekcio PEA. Post la ekrego de l'faŝismo al niaj vicoj venis la socialistaj k-doj el ALLE, la malnovaj SAT-anoj. Jam depost duona jaro aperas tre vigla PEK-bulteno, antaŭe per helpo de nia franca sekcio k nun memstare. Ĝi estas nun sur plej bona vojo akiri la plimulton de laboristaj esp-istoj en Aŭstrio, la iama citadelo de ISE.

En *Bulgario* en 1932-33, ni havis tre viglan k duonleĝan movadon. Post la faŝista militista renverso BulLEA devis transiri al kaŝa laboro, ne plu povis aperi la fama PEK-gazeto « Internacia Labkoro ». Parto de l'CK-anoj arestiĝis. Nuntempe en kelkaj distriktoj, precipe Sofio, oni denove aranĝas kursojn k PEK-as.

*Japanio.* — Ĉi tie nia movado ricevis plej fortan baton komence de pasinta jaro pro aresto de CK-anoj, per rompiĝo de la ligoj inter la lokaj filioj. Ĉesis aperi gazetoj k la PEK-bultenoj. Tiu bato efikis despli peze, ĉar niaj k-doj faris gravajn erarojn. Ili per troa severo en ideologiaj postuloj izoliĝis de la vastaj laboristaj amasoj k ankaŭ de rondoj de progresemaj esp-istoj. Anstataŭ zorgi pri kreo de esp-povaj PEK-laborantoj, pri varbado de novaj membroj, ili sin limigis al nuraj teoriaj studoj k al politika laboro laŭ sama maniero, kiel ĝin faris la partio k sindikatoj. Feliĉe grupo de junaj k-doj, de PEK-entuziasmuloj en Kobe, prenis la iniciaton por rekonstrui JPEU-on sur pli larĝa progresema bazo.

Laŭdinde laboris niaj *ĉinaj* k-doj, sub la tre ĝusta moto « Esperanton por la liberigo de Ĉinio ». Certe ni komprenas, ke en multaj lokoj la esp-ista vivo ĉesis pro la ĉiam pligrandiĝanta kaoso de civila milito. Tamen la k-doj devas plibonigi siajn ligojn ankaŭ kun aliaj urboj k precipe instigi la esp-movadon en sovetaj regionoj. Atentinda estas la influo de nia movado sur la neŭtralan movadon. Ni eldonas nun preskaŭ solaj lernolibrojn, vortarojn. Atentinda estas nia ideologia influo. Niaj k-doj gvidas ankaŭ la progresigan movadon por latinigo de la ĉina alfabeto.

En kelkaj landoj ekz. en Hispanio k en Ĉekoslovakio ni jam havis UK-ojn, kiuj tamen post mallonga ekzisto malaperis. En ĈSR ni havis IPE-eman grupon en Zlin, grupeton en Praha k kelkajn grupojn de iama Bohemia GLEA-distrikto. Kiel klarigi, ke nia UK, gvidita de fervora k-do el Zlin, malaperis, ke niaj grupoj en Bohemio preskaŭ disfalis k aliĝis al la burĝa movado? Unu kaŭzo kuŝas en la malfeliĉa naciisma antaŭjuĝo, ke la ĉekaj k la germanaj k-doj ne povas kunlabori en unu asocio, kiun niaj k-doj ne sukcesis supervenki. La alia kuŝas en la malemo fari opozician k unuigan laboron.

*Hispanio.* — PUIL, la hispana LEA, fondiĝis antaŭ la unua IPE-kongreso. Al ĝi aliĝis nur malmultaj grupoj k k-doj, unue pro la alta kotizo k due pro la karakteriza apartiĝema malsano hispan-portugala — ĉiu grupo deziras mem esti societo preskaŭ sendependa. PUIL eldonis gazeton « Proleta Voĉo » kun sufiĉe neŭtralema enhavo k propagando por SAT. Ni provis en la antaŭaj jaroj starigi UK-on per la madrida IPE-ema grupo, sed ili ne sukcesis akiri la necesajn ligojn k konviki la k-dojn ĉu fondi IPE-grupojn, ĉu aliĝi por opozicia laboro al PUIL. En la lasta jaro kreiĝis IPE-rondo k PEK-filio sur la Kanariaj insuloj (hispana kolonio). Ni instigis la k-dojn helpi en la rekolekto de IPE-aj fortoj en Hispanio. Bedaŭrinde ĝis nun ili ne sukcesis retrovi la madridajn aktivulojn k persvadi la k-dojn ŝanĝi sian rilaton al IPE. Nun post kiam PUIL mem fariĝis neleĝa, la simpatioj al IPE ege kreskis k estos nia tasko per helpo de niaj kanariaj k francaj k-doj helpi al regrupiĝo de PUIL sur la bazo de IPE. Antaŭ ĉio ni devas sekuri reeldonon de interliga IPE-ema informilo k la pluan aperon de hispana PEK en Francio.

En *Portugalio* estas simila objektiva situacio, tamen LEA ne ekzistas. En Lisboa pasintjare fondiĝis IPE-grupo « Sur Posteno », kiu neregule dissendas ŝajne PEK-informojn. Ankaŭ al tiuj k-doj necesas helpi, fondi portugalan LEA. Niaj provoj dum pasintaj jaroj ĉu per helpo de bulgaraj k-doj, ĉu rekte starigi IPE-movadon en la Balkanaj landoj en Grekio k Jugoslavio ne sukcesis. Pasintjare ni havis ĉelon en la Salonika neŭtrala societo, en kiu niaj k-doj estis la ĉefaj aktivuloj.

Kun *Italio* ekzistas nur unuopaj ligoj proletesp-istaj. En *Latvio, Estonio, Finlando* ekzistas laboristaj esp-societoj, en *Latvio* k *Estonio* simpatiaj al IPE. En *Finlando* estas sekcio de ISE. En Riga aperas PEK-bulteno. Tamen dum kelkaj jaroj ni pro la teroro ne povis atingi ian pluan kreskon de niaj grupoj.

En *Polio* ni vidas lastatempe ĝojigan renaskiĝon. Tuj post kreiĝo de IPE niaj ligoj kun tiu lando rompiĝis. Nur komence de ĉi tiu jaro, post fondiĝo de nova « Internacia Lingvo » en Varsovio, niaj rilatoj kun diversaj lokoj pliboniĝis, k ni esperas, ke ni sukcesos fondi PEK-filiojn k IPE-ĉelojn. Alia grava lando estas *Hungario*. Ĝis antaŭ unu jaro tie ekzistis granda LEA kun 1200 membroj, sekcio de ISE, kiel suborganizo de la socialdemokrata partio. Sed poste, kiam per la junularo enportiĝis nova klasbatalema fluo k simpatio al IPE, ISE k la partio eksigis HESL. Tio efikis kiel denunco al polico, kiu komencis terori la laboristajn esp-istojn. Ni ricevis kelkajn raportojn simpatiajn al IPE antaŭ du jaroj, sed de tiu tempo ni nenion aŭdis. Ankaŭ ĉi tie ni devas trovi solvon.

En Suda Ameriko ni posedas nur individuajn abonantojn al SP en *Argentino* k *Brazilio*. Ĝis nun ni ne sukcesis instigi la k-dojn fari PEK-laboron k organizi grupojn, kvankam la situacio tie estas favora por esp-movado, kreskanta proleta k antiimperialisma movado, romanlingva teritorio.

Kaj nun ĉe la fino ni diru kelkajn vortojn pri SEU. Ĝi certe okupas apartan lokon, ĉar ĝi laboras en la lando de konstruata socialismo. SEU konsistas el esp-organizoj de diversaj naciaj respublikoj sovetaj, Rusia, Ukrainia, Tatara, Blankrusia, Transkaŭkaza ktp. Ĝi mem prezentas kvazaŭ malgrandan internacion. SEU unuigas reprezentantojn de 46 div. nacioj ne nur sovetianojn, sed ankaŭ aŭstriajn ŝucbundanojn, svedajn, hungarajn, polajn, germanajn k aliajn laboristojn, kiuj venis por labori al Sovetio aŭ elmigris.

La organiza strukturo diferenciĝas de tiu en aliaj sekcioj, ĉar la bazo de SEU ne estas la loka grupo, sed la loka komitato, kiu gvidas la laboron de l'SEU-ĉeloj en la fabrikoj k oficejoj de la loko. Sekve la ĉefa laboro estas farata inter la laboristaj amasoj. Celo, al kiu devas aspiri ĉiuj niaj sekcioj en la kapitalistaj landoj. La PEK-laboro estas la nepra tasko de ĉiu SEU-ĉelo k SEU-amika grupo. PEK-filioj ekzistas nur en la plej grandaj regionaj centroj ĉe la regionaj k respublikaj komitatoj de SEU. Ili ofte ekzistas ĉe redakcioj de distriktaj gazetoj, kiuj peras laboristajn korespondaĵojn k mem eldonas bultenojn en rusa lingvo, ekz. en Leningrad, Sebastopol.

SEU eldonas en esp-o « Sur Posteno Klasbatala » kun informoj pri Sovetio k traktoj pri ideologiaj k lingvaj demandoj k « Internacia Lingvo », en rusa lingvo kiu traktas teoriajn problemojn k la problemojn de PEK-laboro. Por kompreni la specifajn kondiĉojn, en kiuj disvolviĝas SEU, la malregulecan aperon de gazetoj, la malgrandiĝon de eldonagado ktp necesas scii la pozicion de esp-a movado en soveta socia vivo. La esp-movado estas tiel nomata « volontula movado », do ne ŝtate subtenata. Neniu centra instanco sin okupis serioze pri la problemo k tial ankaŭ ne subtenis ĝenerale k principe la laboron de esp-istoj. Certe, unuopaj regionaj komitatoj de la komunista junularo, de Ruĝa Helpo k de la sindikatoj subtenis la PEK-laboron, je kiom ĝi donis okulfrapajn rezultojn. Eĉ ekzistas konforma rekomendo de CK de ukraina komjunularo k de l'kultura fako de l' tutsovetia sindikata unio. Kelkaj el konataj k-doj, kiel Lozovskij k Manuilskij rilatas simpatie al nia movado, sed tio ne sufiĉas. La foresto de principa decido aŭ rekomendo flanke de la centraj instancoj certe malhelpas al la laboro sur la lokoj, ĉar la lokaj instancoj ofte mem ne kuraĝas transpreni la iniciaton k tial ankaŭ multo dependas de la ŝanĝiĝantaj funkci-

loj. De tio ankaŭ dependas la provizado de EU eldonejo per papero, kiu ja estas centrig- a por ĉiuj organizoj. Ni ricevas responde al ksiĝo kiel triagrava organizo paperon nur en e malgrandaj kvantoj. En Sovetio simila ek- istado de laborista esp-movado, kiel en la kapi- listaj landoj ne estas ebla. Ĝi nur povas pli rosperi k pli rapide evolui, se okazos principa ecido pri la teoria k praktika valoro de esp-o lanke de la aŭtoritataj instancoj. Tion atingi stas malfacile ĉar ni antaŭe devas pruvi, ke nia roblemo estas aktuala, ni devas refuti la kon- raŭargumentojn de diversaj pseŭdomarksistaj ontraŭuloj de esp-o. Pri tia agnosko nun bat- las niaj sovetiaj k-doj. En la proksima tempo ni atendas principan k pli ĝeneralan solvon ri problemoj de nia movado, kiu donos nun ne la bazon por rapida progreso. En tio devas elpi ankaŭ la ekstersovetiaj k-doj, pliintensig- nte sian PEK-laboron k starigante principe la roblemon pri la valoro de esp-o antaŭ siaj klas- atalaj laboristaj organizaĵoj.

*Kolonia laboro.* — Pri ĝia gravo ni jam atent- is dum la Lille-konferenco. Intertempe ni havas noti jam la sukcesojn. Se en la metropolaj andoj ni la ĉefan atenton metas sur batalo ontraŭ faŝismo k milito, do en la dependaj andoj ni metas ĝin sur batalo kontraŭ imperial- mo k serve al la liberiga batalo. Pro tio estas la celo antaŭ ĉio akceli la neŭtralan progres- man indiĝenan esp-movadon, kiu kreskas nun n plej diversaj landoj. Ni devas ĝin influi deologie k helpi al ĝi per partopreno de niaj doj en ĝi, per starigo de korespondoficejoj, er konsiloj, materialoj ktp. Principe ĉiu IPE- ekcio de la metropolo devas protekti la mov- don en kolonioj de la propra lando. Necesas, - la sekcioj k UK-oj elektu specialajn k-dojn, iuj zorgu pri organizado de la laboro en tiuj andoj.

*Pri helpo al malfortaj sekcioj.* — Tiu helpo ontriĝis tre utila, sed ĝi ne estis sufiĉa, ekz. helpo en eldono de PEK-bultenoj por teror- andoj en Anglio k Francio, la helpo per perado leteroj, per sendo de literaturo ktp. La helpo vas ankaŭ nepre koncerni la ideologian k or- nizan flankon. Tial estus necese, fiksi la dev- n de niaj sekcioj tiurilate: al FEP ni transdonu protektadon super Hispanio, Italio, Grekio k goslavio. Al BLEA: Usonon, Estonion, Lat- on k Germanion. Al sveda UK: Norvegion, nion, Finlandon. Al la svisa UK: Ĉekoslovak- n k Aŭstrion. La k-doj, elektitaj de la LEA- taroj aŭ de UK-oj por kolonia laboro prizorgu kaŭ laboron en protektataj landoj.

*Centraj organoj de IPE.* — Post kiam la IPE- transiris al Sovetio, la laboro dividiĝis inter k IPE-O en Amsterdam k tiu labordivido ontriĝis tre taŭga k kontentiga. La IPE-C sin upis pri ideologiaj k ĝeneraldirektivaj aferoj, organizaj aferoj en la tiel nomataj demo- ataj landoj, dum IPE-O ricevis la komision de E-C pri organizado en aliaj landoj, por la daktado de SP k la tuta administrado.

La agado de IPE-C estas multeflanka. El versaj landoj venas raportoj, demandoj, petoj. ni devas pridiskuti la tiean situacion, doni tajn direktivojn, konsilojn, sendigi material- n k verki artikolojn k tiel helpi al la movado. cipe multe da atento estas metita sur la UK k al landoj, kie nia movado estas malpli a. Niaj interligoj kun la sekcioj pliboniĝis, nenaŭ la eŭropaj, tamen ni devas plendi pri P k LEA-NA, kiuj respondas tre malakurate. lfacile estas ankaŭ interrilati kun Aŭstralio malproksimo. Niaj provoj akiri organizajn ojn kun Palestino k Sudameriko ne sukcesis. mpreneble, la direktivoj, sendataj nur tiam vas doni sian tutan utilon, se la IPE-sekre- aro estas detale informita pri la laboro k o de IPE-organizoj en diversaj landoj. Tamen devas plendi pri tio ke la plejmulto de la doj, ne sendas al ni tiujn raportojn, eĉ se en formo de protokoloj de siaj estraroj ne das al ni, malgraŭ admonoj k la koncerna ido de Lille-a konferenco. Sed tion ni nepre as postuli. Por helpi al raportado pri la ko de l'organizo laŭcifere ni intencas eldoni cialajn raportfoliojn, kiuj havas demandojn la membrokvanto, nombro de grupoj, de K-filioj, pri stato de uf laboro ktp.

La interliga laboro ĉefe kuŝis sur la ĝenerala sekretario k-do Homo, kiu mem prizorgis la landojn de Centra k Okcidenta Eŭropo k konsilis la laboron al tri aliaj sekretarioj por ekster- eŭropaj landoj k-doj Miĥajlov k Podkaminer k por Nordeŭropo k-do Ruvinskij.

El la fakoj de IPE-C komence bone laboris la *radiofako*, kiu regule disaŭdigis per Lenin- grada radiostacio ĝis nuna jaro IPE-informojn. Nunjare ni bedaŭrinde ne havas tiun eblon pro ŝanĝo de la programoj de nacilingvaj disaŭdig- oj, kiuj okupis nian tempon. *La literatura fako* ellaboris eldonplanon por Ekrelo k diskutis ĝin kun k-doj en diversaj landoj k kun IAREV. Ĝi entreprenis multajn klopodojn kune kun SEU por ebligi la rean eldonagadon. En la proksima tempo ni atendas favoran decidon pri tio ĉe la instancoj. La PEK-fako preskaŭ ne funkciis ĉar mankis spertaj k-doj. Ĝia laboro konsistis ĉefe en perado de leteroj k helpo al eldono de Leningrada PEK-bulteno. Kelkfoje ĝi ankaŭ direktivis al niaj Nordeŭropaj landoj k ekstereŭropaj, sed tio certe neniel povis anstataŭi la mankon de internacia PEK-centro. La fako ankaŭ estis kreita nur provizore ĝis starigo de internacia PEK-centro, ĉar la sebastopola PEK-filio rifuzis tiun taskon. La internacian PEK-C oni nepre devos starigi nun en iu el la eŭropaj landoj, por plifaciligi la peradan laboron. Kontentige solviĝis la afero pri la lingva komitato de IPE (IPLK), kiu finfine eklaboris en Ĥarkovo. IPE-C sukcesis eldoni du n-rojn de Informilo por funkciuloj. Pli ofte durne ne eblis.

*Plenumkomitato.* — Laŭ la statuto la plenumkomitato sin devas okupi pri gravaj aferoj de nia movado inter niaj kongresoj. Sed laŭfakte tio okazis nur en tre eta skalo k ne regule. Al la PK apartenas la gvidantoj de ĉiuj niaj sekcioj k UK-oj k krome po unu k-do alelektata je ĉiuj mil membroj. La plimulto de tiuj k-doj tamen aŭ loĝas en tre malproksimaj landoj, aŭ en la teroraj landoj, kun kiuj rapidaj interrilatoj ne estas eblaj. En vico de aliaj landoj ni havas en la gvidado tute novajn k-dojn, kiujn ni bone ne konas k kiuj ofte ne estas spertaj en nia movado. Pro tio ne estis eble diskuti kun ĉiuj la urĝajn problemojn. Ni devis limiĝi je perletera opiniinterŝanĝo kun kelkaj el niaj plej aktivaj k-doj el IPE-O k niaj grandaj sekcioj, despli, ke pri multaj demandoj oni ne povas verki longajn k detalajn cirkulerojn k informilojn. Ni opinias, ke ĉi tiu praktiko ankaŭ estonte estas la plej racia en nunaj cirkonstancoj. Ni proponas, ke la kongreso aprobu kiel plenumkomitatanojn, kiujn ni ĝenerale konas k kiuj loĝas en facile k proksime atingeblaj landoj.

La kunlaboro inter IPE-C k IPE-O nunjare estis multe pli bona ol antaŭe, ĉar ni daŭre reciproke informis nin pri la farata laboro k pri la intencataj paŝoj. Per tio ni sukcesis eviti preskaŭ paralelan laboron k plibonigi la ligojn kun diversaj landoj.

*Pri Kongreso.* — La kongreso estas la ĉefa direktanto de nia movado, ĉar ĝi aprobas ĉiujn raportojn de IPE-organoj k fiksas la pluan linion de l'tuta IPE. Pro tio speciale gravas bona prepariĝo k organizo de la kongreso. La nuna kongreso certe havis multajn mankojn en sia preparo, ĉar ne ĉiuj sekcioj partoprenis k ne organizis antaŭan diskutadon de problemoj, kiuj staras antaŭ la kongreso.

Koncerne la financan situacion de IPE k pri administrado raporton al vi prezentos IPE-O. Same IPE-O faros aldonan raporton pri organizaj ligoj, kiuj al ĝi estis komisiataj. Ni finas la raporton kun la admono: la organiza laboro estu unu el la ĉefaj taskoj de ĉiuj IPE-anoj. (Apl.)

## PLEJ GRAVAJ REZULTOJ DE LA 2-a IPE-KONGRESO (Antverpeno)

1. **Starigo de Internacia PEK-Centro (IPC) en Britio.**
2. **Starigo de Internacia Komitato Unueciga en Parizo.**
3. **Liverado de SP al ĉiuj IPE-anoj.**
4. **Patronado al IPE-organizoj laborantaj sub eksterordinaraj kondiĉoj.**
5. **3-a IPE-Kongreso okazos en 1937 en Parizo.**
6. **Aliĝo de IPE al la Internacia Komitato kontraŭ Milito k Faŝismo.**

# DISKUTO PRI LA UF

K-do SMITH: Ni pli poste diskutu la raporton de IPE-C kun tiu de IPE-O k de la landoj samtempe. Hodiaŭ laŭ nia hieraŭa interkonsento ni nur diskutu pri uf. (Konsento.)

Mi devas informi vin, ke alvenis la 3 k-doj de la SAT-kongreso k-do Scott (Britio), k-do Neergaard (Danio), k-do Prent (Nederlando), kiuj kiel delegitaro havas komision diskuti kun ni pri uf. (Aplaŭdoj.)

Mi bonvenigas la 3 k-dojn, esperante, ke niaj uf-diskutoj havu bonan rezulton. (Aplaŭdoj.)

*(K-do SMITH nun legas invitleteron de IPE-C al SAT k la respondon de SAT-plenumkomitato. Tiu ĉi letero aperos en venonta n-o de SP kun respondo de IPE-C.)* Nun ni aŭskultu ankoraŭ la parton relegatan el la Ideologia raporto de la IPE-C.

K-do RESPE leginte la koncernajn partojn: La raporto ne resumas komplete la problemon pri uf. En la diskutado ni do ankoraŭ devas pli koncizigi tiun problemon. Ni diskutas ne nur kun SAT pri uf, sed kun ĉiuj aliaj organizoj ankaŭ. IPE opinias ke PEK-laboro estas la bazo, sur kiu ni povas unuiĝi. La uf-agado okazu en la senco de batalo kontraŭ faŝismo k milito. Mi volas akcenti ke nur per praktika laboro ni povas akceli tiun batalon. Hodiaŭ ni ne povas elĉerpi la problemon. Mi alvokas la k-dojn, ke ili, reveninte hejmen de la Kongreso priparolu la problemon de uf kun la esp-istoj de siaj landoj ke ne forgesi pri la diskutoj tie ĉi.

K-do RUSSELL SCOTT (SAT - Britio): Oni ne estu surprizata, ke hodiaŭ mi venas kun insigno de SAT kiun mi hieraŭ ne portis. Kiam oni elektis min kiel delegiton, oni ne sciis, ke mi estas ano de IPE, sed dum la diskuto mi diris ke mi jam havas bileton por Antverpeno k eble tio instigis ilin elekti min por ŝpari la veturmonon. La SAT-anoj ne estas malviglaj kiel ofte diras IPE-anoj. Estas unu nia k-do, kiu biciklis de Parizo al Antverpeno. Tio pruvas, ke la SAT-anoj ne estas malviglaj. Ni forgesu la pasintan historion. Franca k-do parolis pri PEK-laboro, k mi bedaŭras, ke la SAT-Kongreso ne aŭdis pri tio. Dum veturo en vagonaro mi skribis la vortojn direndajn, sed kiam mi aŭdis la raporton mi konstatis, ke miaj vortoj ĝuste finas tie, kie ili devas komenci. Unueco havas du flankojn, strukturan k praktikan. Do pardonu, ke mi legas mian raporton, kiu ĉefe estas struktura. En SAT estas multaj frakcioj, tial mi havas manuskripton. Mi ripetas, ke ĉiu deziras unuecon. Nur temas pri kia unueco. La afero similas al la fraŭlino de Riga. Ĉiu organizo konsideras ke ĝi estas la belulino, k la alia estas ruza besto, sed ambaŭ organizoj devas vidi la utilon unu de la alia. Estas bone, se kelkaj k-doj estus membroj de ambaŭ organizoj. IPE nur akceptas unutendencajn k-dojn. Tamen mi ne povas kompreni kial BLEA ne postulas politikan deklaron de siaj membroj, kvankam ĝi estas sekcio de IPE. Mi estas BLEA-ano k mi povus esti eĉ faŝisto — sed vi ne scias ke mi estas SAT-ano. Kelkaj komunistoj restas en SAT k ne volas aniĝi al IPE pro la insulta epoko. La instrukcioj kiujn Moskvo nun eldonas pri uf instigas vin agi laŭ maniero, kiu ne estas kontraŭ la ideo de SAT. La unua paŝo do estas farebla k farinda. La vicoj de SAT do estas enireblaj por vi k mi esperas ke multaj utiligos tion, almenaŭ tiuj, kiuj havas tempon k monon. Dum SAT-Kongreso mi pridiskutis strukturajn problemojn de uf k tial mia raporto ne tuŝas la praktikan laboron. Bedaŭrinde mi ne aŭdis la raporton de vi pli frue. (Parolinto celas la ideologian raporton pri uf.) (Aplaŭdo.)

K-do TURNER: La delegito atentigis min, ke estas tiom da frakcioj en SAT, ke necesas

tre zorge kontroli siajn dirojn. Tiel ne estas ĉe ni, sed pro tio ke tiuj diversaj frakcioj kredeble havas la okazon legi pri niaj diskutoj pri la uf. mi ankaŭ estas tiel singarda, kiel la k-do k skribis miajn dirojn. — Cetere la protokolantoj benos min. Mi tre ĝuis la paroladon de K-do Scott, delegito de SAT, sed mi ne plene konsentas kun li, ke la historio estas io forgesenda, sed ne opinias, ke mi volas imiti aliajn kiuj ŝajne ĉiam vivas en la pasinteco. Koncernas nin la estonteco. Se mi iomete ankaŭ fosas en la historio estas nur por montri al vi tion, kio laŭ mia opinio estas la ĉefa baro al unueco inter ni IPE-anoj k vi SAT-anoj. Tiu ĉi afero ne estas afero pri komplikaj teorioj elmetataj de tiu aŭ tiu eminentulo. Ĝi estas afero por la simplaj laboruloj, kiuj kun multa penado akiris esp-on por ĝin uzi por sia klaso. Foje kiel fervoraj SAT-anoj ni ankaŭ parolis multe pri utiligo de esp-o por la servo de nia klaso, sed ni nur parolis k sekve ĉiam estis disputoj. Hodiaŭ ni malmulte parolas, sed ja tre multe faras por utiligi praktike la lingvon (aplaŭdoj). Rezultas el tiu komuna agado, ke laboristoj kun malsimilaj politikaj sintenoj harmonie kunlaboras. Unue oni sincere faru provojn efektivigi la devizon « Esperanto en la servo de la laborista klaso » per konkretaj faroj sen atendi dekreton de tiu aŭ tiu estraro k vi mem eltrovos en la viva praktiko ĝuste kiom da vero troviĝas en la diro ke « PEK estas cenzura aparato de Stalin ». Mi volas traduki paragrafeton el nia Anglalingva gazeto « Contakt » por la profito de scivolemaj SAT-anoj. Ĝi aperas sub la rubriko « Kiu ni estas k kion ni faras ». Jen la cito: « PEK trovos por vi la bezonatajn adresojn en eksterlando, tradukos viajn leterojn k donos al vi kopion de la traduko. Respondojn ni tradukos k transdonos al vi senprokraste. *Ni aldonas nenion, ni forprenas nenion.* La korespondado estas la via, ni nur ebligas la funkciadon. » Ĉu do, necesas meti iujn antaŭkondiĉojn pri agnosko aŭ malagnosko de tiu aŭ tiu doktrino? Tiajn postulojn ĉiu sincera laboristo povas senhezite nomi ruzo, kiu havas la celon ne unuigi la laboristan klason sed eĉ male, celas daŭrigi la nunan malunuecon (aplaŭdoj). Kredu min SAT-anoj, ni vere trovos la vojon al vera proleta unueco en praktika laboro sed certe ne per vana serĉo post tiu aŭ tiu mistika formulaĵo pri agnosko aŭ malagnosko de etiketoj. Same, se oni volas starigi fakojn, kiuj prizorgu korespondojn ktp propr-ajn nur al sia aparta politika kredo ni elspezos la tutan vivon k vane. (Aplaŭdoj.)

K-do BERLO (Francio): Unue mi petas la permeson plenumi komision donitan al mi saluti vin je la nomo de IFEPE. Mi bedaŭras ke vi ne havas la bonŝancon aŭdi k-don Boubou mem, kiun certe ĉiu el vi almenaŭ laŭnome konas, ĉar temas pri uf. Jen la konkretaj proponoj faritaj de IFEPE:

1. Nur kunlaboro (komuna agado uf-a) povas prepari laŭprincipan organizan unuecon.

2. La sola tutmonda organizaĵo agnosku proletan internaciismon, fariĝos la kultura fako de la sindikata Internacio unika. Tial ĝi havos internaciisman strukturon (konsistas el naciaj sekcioj) sekve SAT devas rezigni sian sennaciecan strukturon, kiu forigas prirespondecon k volon de landaj sekcioj.

3. Ĉiu tendenco povu enesti senĝene en la unika organizaĵo. La Internacio Esp-a havos la karakterizojn de la unika sindikata Internacio. Ĝi ne aliĝos doktrinon de partio. Tial IPE devas rezigni sian statutan marksistan bazon (por ebligi aliĝon de senpartianoj k de anarkiistoj).

4. Kompreneble ĉiujn demandojn pri ŝuldo, cenzuro, uzurpo, eksigoj, kiuj rilatas pasintajon, oni rifuzu diskuti.

IFEPE estas plej bonega ekzemplo pri unueca organizo k unueca agado. En ĝi kunlaboras edukistoj-laboruloj de SAT, ISE k IPE k ne organizitaj. Kial tio estas ebla inter ili? Ĉar la IFEPE-organo ne estas iu teoria diskutilo. En ĝi la edukistoj-laboruloj raportas nur faktojn el sia vivo. Temas pri la klasbatalo en ilia medio, k kiam temas pri faktoj pri la konkreta vivo ne povas ekzisti malunueco. Vi permesos aldiri kelkajn vortojn pri la proponoj de SAT letero k alludi al la diroj de la SAT-parolantoj. La unuan punkton kiu temas pri reciproka publikigo de la leteroj en SP k Sennaciulo ni ja povas akcepti. La duan punkton (komuna disvendado de libroj) ni povas akcepti nur se en SAT-literaturo ne plu aperos kontraŭsovetiaĵoj. PEK ne estis, ne estas ke ne devas esti politikaj, teoriaj organoj. PEK estu raporta bulteno pri konkreta vivo de laboruloj el ĉiuj landoj k kiam laboristo konkrete raportas pri siaj viv-labor salajrkondiĉoj ne povas temi pri politiko, aŭ se tio estas politiko neniu proleto rajtas sin deteni de tia ago. Do tia PEK-bulteno ne povas esti la tasko de iu frakcio ĉu trockisma, komunista, anarkiista k socialista. Ĝi devas esti la tasko de ĉiu proleta organizo. Mi parolis dum la SAT-Kongreso en Parizo k dum mia vojaĝo al nia Kongreso kun multaj SAT-anoj. Ili mem ne kontentas pri la bazo de SAT. Ili demandas firman klasbatalan bazon. Unu Nederlanda SAT-k-do diris al mi: En la kongreso ĉeestis laboristoj el diversaj landoj. Do oni devas pridiskuti ekzemple, kion ĉiu el ni devas fari se morgaŭ revenante al nia lando nia kapitalista registaro donas al ni la armilon en la mano. En laborista kongreso eĉ se ĝi estas esp-a oni devas pritrakti tiajn klasbatalajn temojn. Ĝi ne rajtas sin malinteresi de ili. La Angla SAT-k-do, kiu estas membro de la IPE-BLEA pruvas, ke en IPE estas laborista demokratio, k ke oni ne postulas de iu partipolitikan deklaron. Tio ne signifas kiel mokeme volas diri tiu SAT-k-do, ke ni akceptus eĉ faŝistojn. Ni akceptas ĉiujn proletojn klasbataltendencajn. (Aplaŭdoj.)

K-do AUSCH (Belgio): Estas necese fari uf-on. Mi rekomendas, ke SAT-anoj k IPE-anoj kontaktiĝu unuope k parolu pri uf. Ni devas konsideri SAT-anojn kiel k-dojn. En Hungario SAT-anoj nur povas ekzisti malleĝe ĉar tie oni konsideras SAT-on revolucia organizo.

## UNUECIGA KOMITATO

K-dino KANDEL (Nederlando): La organiza unueco estas afero duagrada. La ĉefaĵo estas komuna agado. Ĉar ni ne havas sufiĉe da tempo plene pridiskuti la aferon mi proponas ke ni starigu komitaton konsistantan el tri SAT-anoj k tri IPE-anoj, kiuj priparolu la praktikan bazon por unueca agado. (Konsenta moviĝo.)

K-do MALFERE (Francio): Scott intermiksis nin kun komunistoj, sed nia kongreso ne estas komunista kongreso, ĝi estas kongreso de IPE. En IPE en FEP k aliaj organizoj ne ĉiu membro estas komunisto. En nia regiono estas el 350 membroj nur 60 komunistoj. FEP akceptas SAT-anojn. En PEK ni faras praktikan laboron k ne diskutas politikajn problemojn. Ĉiu revolucia laboristo do povas senĝene kunlabori. Bedaŭrinde SAT ne donis respondon al niaj proponpunktoj, sed nur sendis novajn proponojn. Ni diskutu iliajn proponojn, bedaŭrante ke ili ne faris la saman kun niaj.

K-do THOMPSON (Britio): Mi konsentas pri la propono de k-dino Kandel. Ni faras praktikan laboron, ankaŭ SAT devas fari ĝin. Per tio eble el ambaŭ organizoj fariĝos unu. Mi ankaŭ estas ano de sama partio kiel Scott (ILP), sed mi estas internacia korespondanto por ĝi. SAT-anoj laboru en SAT k IPE-anoj en IPE por nia komuna celo, la proleta revolucio. Se oni estas ano de SAT oni nur restas SAT-ano, sed se oni estas ano de IPE oni estas ano de ia k ĉia organizo de tutmondo kiu batalas por nia klaso. (Aplaŭdoj.)

K-do BERLO (Francio): IPE estas ofte denuncata de SAT kiel filio de Moskvo k ke ĝi ricevas ĝiajn direktivojn de Stalin. Tion nun kredas multaj SAT-anoj, sed tio ne veras. Ni postulas de niaj membroj nur, ke ili estu por la klasbatalo k ne akceptas por politika aparteno.

K-do PRENT (SAT - Nederlando): Se en SAT ni parolas pri certa reĝimo en Sovetio tio ne signifas ke ni atakas Sovetion. La kvara punkto de IPE-statuto diras ke nur anoj de dialektika materialismo povas esti ano de IPE, sed mi ne povas aprobi tion. En SAT-statuto ne estas tiaj devigaj reguloj. Kiam mi skribas leterojn al korespondantoj mi ne skribas en nacia lingvo sed rekte en esp-o. Mi do ne bezonas tradukon. Ni lasu la historion k ne diskutu pri tio, ĉar tio neniam kondukas al unueco. Mi ne scias ĉu SAT akceptas elekton de Komitato. La SAT-kongreso nun jam pasis k mi ne povas decidi pri tio. Mi devas demandi pri tio Plenuman Komitaton de SAT. En nia nuna kongreso ni esprimis plenan konfidon al la Plenuma Komitato de SAT. Nia kongreso ankaŭ esprimis, ke SAT ne povas rezigni je la ideo de sennaciismo. La fakto, ke SAT ne povas fondi leĝajn grupojn en Hungario pruvas, ke SAT estas revolucia organizo alie la registaro ne persekutus nin.

K-do Paul NEERGAARD (SAT - Danio): Kion mi aŭdis ĝis nun mi plene povas subteni la vortojn de mia k-do. Mi esperas ke ni baldaŭ trovos la bazon por komuna batalo kontraŭ faŝismo k milito. (Aplaŭdoj.)

K-do RESPE: Necesas unue krei unuecon de agado k due ni parolu pri organiza unuiĝo. La ĉefa punkto estas la uf-agado. Se ni povas presi la leteron de SAT kun nia respondo ni povas konsenti, sed tiam ni devas postuli, ke SAT rilatu same al niaj proponoj. La dua SAT-ano parolis pri la politikaj taskoj de esp-o. Li diris ke proletaj esp-istoj ne havas politikajn taskojn. Ni ne deviĝas niajn k-dojn partianiĝi. Se ni ekz. statistikus la partianojn en BLEA ni devas konstati, ke estas nur tre malmultaj partianoj. Same estas en IPE. En Aŭstrio kunlaboras ISE-anoj kun IPE-anoj k ili agadas praktike. Ni ankaŭ ne propagandas, ke necesas aliĝi al IPE. Sed ĝuste ja kun neIPE-anoj ni volas fari uf-on. Kiu ricevis iam ĝenerale pli bonajn informojn el Aŭstrio ol donas la nuna PEK-bulteno? Ĉiuj niaj k-doj havas la taskon batali kontraŭ faŝismo k milito. Tiu estas politika tasko. Lanti akre kontraŭbatalas Sovetion. Tiu estas politika afero. Do Esp-istoj stariĝas al si politikajn taskojn. Ni ne estas fanatikaj k tute ne diras, ke Sovetio estas paradizo, sed ni devas energie protesti kontraŭ la diroj de Lanti kiu sisteme kalumnias Sovetion. (Aplaŭdoj.) Lanti diris, ke proleta esp-a movado devas esti senpolitika. Dank' al la « senpolitika » agado la okuloj malfermiĝis al SAT-anoj k tio ebligis la ĉeeston de SAT-anoj en nia Kongreso. Ni ne volas havi uf-on nur kun SAT-anoj sed ni proponas uf-an agadon ankaŭ al aliaj esp-o organizoj. La SAT-anoj montris, ke ili ne estas klaraj pri PEK-laboro. Mi ĝojas pro tio, ĉar ni havas bonan perspektivon k kiam ili komprenas ĝin bone SAT-anoj certe parolos alie. Anglaj K-doj penetris per PEK-laboro vastajn neesp-istajn amasojn. La SAT-anoj postulis, ke estu ebligata al ĉiu la individua korespondo kun Sovetio, sed tia korespondo ne *estas* barata, ĝi estas eĉ rekomendinda. Tamen mi ne parolas pri individua korespondo sed pri PEK-laboro, ĉar per PEK ni helpas al la laboristoj k organizoj ne esp-istaj. Ni devas esti tre singardaj pri tiu aŭ alia ideologio k ankaŭ pri sennaciismo. Nur unu problemon mi volas tuŝi, la kolonian problemon. Unua eldono de Laborista Esp-ismo enhavas tezojn kiujn oni strekis en nacilingvaj tradukoj. La IPE-vidpunkto estas, ke laboristaj esp-istoj devas okupiĝi pri kolonia problemo. Mi esperas ke SAT-anoj komprenas tion, kion ni deziras starigi. Diskutu la eblecon starigi komitaton kiu kunligos la diverstendencojn de SAT-anoj k IPE-anoj. La uf-problemo estas tre delikata. Ĉiu, ankaŭ SAT-anoj certe ĝojas pri la rezulto de nia diskuto. Mi revenas al la propono de K-dino Kandel starigi komitaton kiu entenas reprezentantojn de ambaŭ organizoj por fari pluajn sugestojn rilate tiun problemon. Mi esperas ke per tiu elekto ni faros pluan paŝon al uf-agado. Por la uf. sur posteno! (Aplaŭdoj.)

## KVARA LABORKUNSIDO, 11.8.35 14.00 h.

*Prezidas k-do BERLO (Francio)*

*Estas farataj ankoraŭ kelkaj rimarkigoj pri la uf-diskutoj.*

K-do PRENT (SAT - Nederlando): Nederlanda LEA havas siajn membrojn ĉefe per helpo de SAT. Nia anaro kreskis en ok jaroj de 75 al 4000 membroj. Tio estas granda sukceso. Se IPE povas pravigi sian ideologion SAT ankaŭ povas pravigi sian. Mencio de faktoj okazintaj ne estas atako.

K-do NEERGAARD (SAT - Danio) Respe

faris rimarkojn pri Lanti. Tiu igas min klarigi al novuloj kiuj ne konas SAT. SAT ne respondecas pri la diroj de Lanti. Multaj SAT-anoj ne havas saman opinion kiel Lanti. La kontraŭsovetaj broŝuroj ne estas la opinio de SAT. Ni devas distingi inter eldonaĵoj de privatuloj k tiuj de SAT. Lanti diras, ke SAT ne havas politikan taskon. Mi kiel SAT-ano diras, ke ni havas. Ni havas politikan taskon, sed ne partipolitikan taskon. Ni ankaŭ batalas kontraŭ faŝismo k milito. La granda plimulto de SAT-anoj ne estas kontraŭ PEK-laboro. Tiu laboro estas tre bona, ĉar per ĝi ni propagandas esp-on inter neesp-istaj rondoj. Mi kredas ke mi reprezentas la vidpunkton de plejmulto el SAT-anaro. Ni SAT-anoj volas kunlabori por PEK, sed pri tio mi ne demandas vian opinion, ĉar estas memkompreneble ke ni faru PEK-laboron. Ni povas fari privatan k ankaŭ kolektivan korespondon. Mi proponas, ke oni diskutu pri la punktoj de SAT-proponoj k poste viajn proponojn k fine via kongreso balotu pri ili. (Aplaŭdoj.)

K-do TURNER (Britio): Ni faru laŭ la propono de k-dino Kandel, starigante komitaton. Mi proponas kiel IPE-reprezentantojn gek-dojn Berlo, Malfere (Francio) k Kandel (Nederlando).

*(La propono de k-do TURNER estas akceptata. La reprezentantoj de IPE k SAT tuj forlasas la kongresejon por kunsidi aparte.)*

## RAPORTO DE LA IPE-OFICEJO

*K-do BERLO legas salutteIegramon de Leningrada SEU-komitato k poste por prezento de la raporto de IPE-O, Amsterdam, donas parolrajton al*

K-do RESPE:

Nia Internacio antaŭ la konferenco k post ĝi efektive sukcesis likvidi organizajn perturbojn, kiujn kaŭzis al ĝi la ekrego de la faŝismo en Germanio. Konsekvence la interrilatoj, kiujn IPE-O havis kun IPE organizoj estis normalaj. Tiun ĉi karakterizon ni tamen devas limigi koncerne landojn kun faŝisma reĝimo, kun kiuj ne ekzistas regulaj rilatoj.

Bedaŭrinde ne ĉiu decido, farita dum la IPE-konferenco en Lille povis esti plenumita. Tio validas ankaŭ por la eldono de la konferenc-protokolo. Oni ja povas diri, ke aperis konciza raporto en SP 25, unua n-o redaktita en Amsterdam, k ke aperis la longa k detala PEK-rezolucio en n-o 26 de SP. Tamen, kvankam ĉi raportoj donis sufiĉan superrigardon k la PEK-rezolucio efektive spegulis la kernan problemon, la seriozon, per kiu la konferenco pritraktis la bazan laboron de IPE, tamen la protokolo estus povinta doni valorajn detalojn.

Laŭ decido de la konferenco en Lille IPE-O devis eldoni IPE-membrokartojn. Krom tio farendis necesa la eldono de novaj IPE-kotizmarkoj. Ni presigis la IPE-membrokartojn en kvanto de 1000, ĝis fino de julio 1935 estis dissenditaj al diversaj UK-oj entute 422 ekzempleroj.

Ĉar la IPE-membrokartoj estas destinitaj nur por la UK-oj, kiuj senescepte estas finance fortaj, ili estas aranĝitaj tiel, ke ili estas uzataj ankaŭ por la grupa kontrolo.

La kotizmarkojn ni presigis en kvanto de 1000. Administrajn klarigojn pri membrokartoj k kotizmarkoj k pri dezirinda maniero de fin-kalkulo kun IPE-O ni publikigis en SP 25.

Nun sekvas punkto, al kiu neniu decido ligis nin. Ni celas eldonon de KUNLIGILO. Tuj post la konferenco en Lille aperis n-o 9 de KL kun konciza raporto pri la konferenco en Lille, la gvidrezolucio ktp. Per tio ni liveris al diverslandaj organizoj k k-doj ne reprezentitaj aŭ ne ĉeestintaj en Lille la unuajn informojn.

Kvankam ne plu apartenis al niaj taskoj zorgi pri la eldono de KL, tamen diversaj cirkonstancoj devigis nin ankoraŭ dufoje doni per ĝi ĉiulandajn informojn.

Fare de k-doj en Svedio ni kontaktiĝis kun tiuj PEK-oj, kiuj estis eldonintaj sian informilon « Ruĝa Informilo » en sia lando mem. Sed pro estiĝintaj malfaciloj en la eldonado de la IPE-O transprenis aperigi liveritan materialon. Aperis tiel unu n-o, la n-o 2 en formo de PEK-bulteno, de kiu ni sendis 91 ekzemplerojn al 38 adresoj en 21 landoj.

Ni ankaŭ faris kelkajn servajn laborojn, permante diversajn korespondaĵojn de diverslandaj k-doj al difinitaj lokoj. Evidente kelkaj perigantoj supozis ĉe ni ne nur helpemon malavaran, sed ankaŭ detektivajn kapablojn, ĉar ili kelkfoje nek aldonis respondkuponon, nek la adreson de la akceptonto.

Per KL 11 la IPE-O informis pri stariĝo de arkivo. Estas vere, ke la iama IPE-Centro en Berlino disponis sufiĉe ampleksan arkivon, kiu komprenebIe komplete malaperis.

Pro loĝejaj cirkonstancoj IPE-O nur antaŭ kelkaj monaoj povis ekinstali arkivon de diversaj esp-gazetoj. Inter ili ni konsideras plej gravaj la eldonojn de IPE-organizoj, ĉu PEK-bultenoj, ĉu organizaj gazetoj.

Tiun akumuladon de esp-eldonaĵoj ne estigas ia sencela kolektemo. Unuavice ni bezonas tiujn eldonaĵojn por daŭra informiĝado, serve al la redakciaj laboroj por SP. Due jen k jen ni ricevas demandojn pri tiu aŭ alia afero k ni ĉiam volonte pretas *laŭpove* kontentigi la demandintojn, apogante nin sur niaj arkivaĵoj.

Ni ĝis nun sukcesis kolekti ĉirkaŭ 80 gazetojn diverstendencajn.

La korespondado pri IPE-Kongreso komenciĝis meze de septembro 1934 (15.9.), kiam ni perletere memorigis al la grupo Solidareco en Antverpeno pri neceso fondi Kongresan Komitaton. 2 semajnojn poste (laŭ letero de 30.9.35) la KK estis fondita.

Ni starigis SP-on en la servon de la Kongreso, konstante atentigis en nia korespondado kun IPE-organizoj pri la kongreso k se necese pri la farendaj laboroj tiurilate. Dum la tuta, antaŭkongresa preparperiodo ni havis daŭran k fruktedonan kontakton kun la KK.

Nia kontakto kun la IPE-C estis konstanta. Pri ĉiuj okazajoj, kiuj estis supozeble ne konataj al la IPE-C pro diversaj kaŭzoj, ni donis informon k atentigojn. Pri diversaj aferoj okazis etskala diskuto perletera, kiun efektive devus partopreni la anoj de la PK k de la UK-estraroj.

Oni povas diri, ke la interrilato flanke de la IPE-O kun IPE-C estis pli bona ol antaŭ la IPE-Konferenco, t. e. pli regula. Tamen IPE-O devas atendi pli aktivan gvidadon rilate sin k rilate la IPE-organizojn flanke de la IPE-C.

Verŝajne ne regas klaro pri la konsisteco de la IPE-O. Ni ĝis nun ne sukcesis starigi aparaton kun ekskluzive por ĝi laborantaj funkciuloj, kun regule okazantaj kunsidoj ktp.

Ni devis rekrutigi la helpantojn el la kontingento de la Nederlanda Unuiĝa Komitato k speciale el ties pli spertaj estraranoj.

La administradon prizorgas k-dino Kandel, kiu ankaŭ kompilas kasraportojn, kiujn ni ĝis nun liveris duonjare (kun ioma prokrasto en la raporto pri la lasta duonjaro de 1934).

La ekspedon de libroj praktikas k-do Visser, Kroman, okazan helpon donis al ni k-dino van Duin.

Ĉiuj gehelpantoj ne povas labori konstante por IPE-O, ĉefe pro tio, ke ĉiuj havas funkciojn en NUK.

Celo, plej rapide atingenda devas esti liberigo de la nunaj helpantoj de aliaj laboroj tiomgrade, ke ilia funkciigo por la internacia laboro estas ebla. La administran laboron ni devas ankoraŭ plibonigi. Kelkfoje mankas sufiĉa superrigardeblo. Ne funkcias sistema admonado al ne pagintoj, pro kio ni havas financajn malfacilojn eviteblajn.

Parolante pri la konsisteco de la IPE-O ni ne forgesu mencii pri helpstacio, kiu troviĝas ekster la sidejo de la IPE-O. Mi aludas pri la ekspedejo de SUR POSTENO, kiu funkcias en Antverpeno sub gvido de k-do Van Dooren. Ĝis la n-o 31 de SP inkluzive ni mem ekspedis la gazetojn. Sed post transiĝo de la presado al Antverpeno, ni interkonsente kun k-do Van Dooren ekspedigis la gazeton de tie. La ekspedo generale funkciis bone.

Antaŭ ol transiri al priskribo pri niaj rilatoj kun la diversaj landoj ni pase konatiĝu kun la amplekso de la interrilato.

IPE-O dissendis dum la laborjaro 306 leterojn, 24 poŝtkartojn, 1307 presaĵojn, entute 1537 poŝtaĵojn, faras ĉiusemajne 35 poŝtaĵojn meznombre.

**Aŭstralio**

La koresponda interrilato kun aŭstralia LEA estis tre malampleksa. Tion evidente kaŭzas la organiza malforto de ALEA, kies organo «Laborista Esperantisto» lastfoje aperis en septembro 1934.

Ĝojigan signon de vivo ni ricevis en formo de letero, datita je 31.5.35. Per ĝi aŭstraliaj k-doj petis adresojn de IPE-sekcioj k PEK-filioj. Ili nun penas starigi PEK-laboron sur firma bazo. Plue tekstas: « Ni ankoraŭ vivas k progresas, sed malrapide. Ni baldaŭ sendos al vi raporton pri nia gazeto k pri nia PEK-laboro. Ni esperas, ke tre baldaŭ nia gazeto ree aperos.» Ni kontente notas, ke aŭstraliaj k-doj petis nian subtenon, ĉar tio plej ofte signalas reviviĝon en la koncerna movado.

**Aŭstrio**

Pri la tieaj okazaĵoj, ĝojigaj por la IPE anaro SP jam sufiĉe informis. La interrilatoj kun aŭstriaj k-doj ĉiam estis bonaj. Okazaj interrompaj ĝenoj klariĝas per la situacio, en kiu aŭstriaj k-doj devas labori.

Instruaj por ni estis la metodoj, uzataj por starigo k firmigo de la PEK-laboro k ni uzis spertojn de aŭstriaj k-doj jen k jen por instigi IPE-anojn laborantajn en multe pli favora kondiĉaro.

**Belgio**

Pri la kontakto kun Belgio plejparte jam estas parolite en la raporto pri kongreso. Belgiaj IPE-anoj (Antverpeno) ja ĉefe koncentris sin je la kongresaranĝo. Tamen funkciis ankaŭ interrilatoj, kiuj ĉefe tuŝis 2 punktojn:

1) la organizan formon de la Belgia movado (ĉu UK, ĉu Sekcio),

2) Vendoprezon de SP.

Volante resti fidelaj al la organizaj principoj de IPE k konsiderante la situacion en la esp-movado belgia ni rekomendis al la belgiaj k-doj la organizan formon de UK.

Klopodante garantii regulan, monatan aperadon de SP k penante eviti imiton de « ekzemplo » ni kritikis la malaltan vendoprezon, postulatan en Belgio por SP, kiu efektive apenaŭ kovras la proprajn elspezojn.

Pri punkto 1 estos traktate ankoraŭ en la finkonkludoj, punkton 2 ni detale pritraktos en la raporto pri SP. Belgaj k-doj regule pagis IPE-kotizon.

**Britio**

Interrilato kun BLEA estis konstanta. Per regule senditaj protokoloj ĉiumonataj ebliĝis daŭra informiĝo k reciproka ligiteco. Siajn financajn devojn BLEA plenumis korekte, regule pagante la IPE-kotizon.

La SP-administrado sub gvido de k-do Rowan (Roŭen) estis pli bone aranĝita ol post lia eksfunkciigo. (Sekvas kelkaj klarigoj.) Ja en aliaj landoj la SP-administrado ankaŭ ne funkciadas senfrote. Sed de BLEA, kun ĝenerale bona organizo oni povas pretendi pli. Certe la nove elektita SP-agentino sukcesos ŝovi la SP-trajnojn sur glatajn relojn.

**Bulgario**

Momente kun Bulgario lamas kontakto. Lasta korespondaĵo datiĝas de 27.5.35. Efektive kiel lastan PEK-bultenon ni ricevis la n-on en februaro 1935 k « Ŝturmulo »n de marto 1935, ambaŭ eldonitajn de sekcio de BuLEA. Oficiala organo « Lumturo » niascie aperis en januaro 1935 lastfoje.

**Ĉinio**

Ni ne multe korespondis kun ĉiniaj k-doj. Tamen ni kvankam ne amplekse, sed daŭre kontaktis kun ili. Informiteco pri la movado ĉiam montriĝis per la notoj en la ĉinia PEK-bulteno (La Revuo), i.a. en la n-o 3-4 de majo-junio 1935 pri la 2-a IPE- kongreso.

**Danio**

La kontakto kun Dania UK malvigliĝis lastatempe. Kvankam la interkorespondado neniam estis tre viva, tamen ĝi reduktiĝis rimarkeble post organiza « krizo » tie.

En marto nome estinta IPE-ano S. delegito dum la IPE-konferenco en Lille subite eldonis flugfolion, per kiu li propagandis la fondon de LEDA (Laborista Esp-ista Dana Asocio), nek parolante pri la Dania UK, kiu ja ekzistis, nek mencia̧nte pri IPE. Dum pentekosto okazis ku

veno en Aarhus, kie fondiĝis Dania LEA (DLEA) k S. fariĝis tie « unua anstataŭanto de la ĉefestraro » (cito el letero de DUK). Mallonge post tio DUK estis reorganizita. Tiam ni nenion pli aŭdis k esperis povi reguligi la kurantajn aferojn kun la anoncita dania delegito.

En nia interrilato ni speciale atentigis pri la neceso de PEK-laboro, pri reorganizado de la DUK-organo kun PEK-paĝo k pri aranĝo de DUK-konferenco aŭtune post la IPE-Kongreso.

**Francio**

Ligoj kun Francio estis konstantaj k aferecaj. Dum la kriza tempo, (en januaro-februaro), kiam ni havis la konatajn malhelpaĵojn pri SP FEP laŭ nia peto pagis la ŝuldojn k per tio sanigis nian financan staton.

FEP aplikis modelan sistemon de SP-administrado, regule sendante kompletajn listojn de SP-abonantoj, kiuj permesas klaran superrigardon pri la nombro de abonantoj.

Ni deziras, ke la interrilatoj kun FEP ankaŭ alirilate kuru tiom sisteme k speciale, ke ĝi partoprenu pli al la internacia laboro.

**Germanio**

Interrilatoj malregulaj.

**Hispanio-Kanariaj Insuloj**

La organizajn ligojn, kiujn estinte ni havis kun Hispanio nun tiel diri transiĝis al Kanariaj Insuloj. Niaj k-doj havas viglan kontakton k bone dividas siajn korespondaĵojn en parton por IPE-C kun ĝeneralorganizaj aferoj k en parton por IPE-O kun specialaj, administraj demandoj.

Kanari-insulanoj komencis la korespondan laboron. Interrilatoj kun kanariaj insuloj en organiza rilato estas pli bona ol kun pli aĝaj IPE-organizoj ekzemple en Norvegio k Danio.

**Islando**

Interesas nin la plendo de islandaj k-doj, ke mankas al ili island-esp-a vortaro, kiu bremsas la lingvan evoluon ĉe la islandaj IPE-anoj. Ni interrilatis kun kelkaj skandinaviaj k-doj por sciiĝi, ĉu eblas servi al islandanoj, liverante al ili « tuskandinavlingvan-esp-an » vortaron. Svedia k-do (O. Boman) sciigis, ke tia servo malmulte utilas, ĉar islanda lingvo konsiderinde diferencas de kiu ajn skandinavia.

Konsideri k efektivigi la eldonon de koncernlingva-esp-vortareto (ŝlosilo) certe servus al nia movado k levus la prestiĝon de IPE.

**Japanio**

Interrilatoj kun Japanio estis seninterrompaj. Japaniaj k-doj komunikis ĉiujn raportindajn detalojn, interrilatante trans IPE-O kun IPE-C.

Niaj interrilatoj ricevis senteblan frapon pro malpermeso al SP en Japanio. Trifoje japania poŝto komunikis, ke SP ne estas enlasita en Japanion k eventuale alvenantaj ekzempleroj neniigataj. Tamen estas zorgate, ke niaj abonantoj k interesitoj sentu nek materian, nek ideologian domaĝon...

**Nederlando**

La interrilatoj kun NUK ĉiam estis tre amika k interhelpa. Pri helpo de diversaj NUK-anoj ni jam raportis sub punkto « Konsisteco de la IPE-O ».

Tamen, inter la NUK-membraro troviĝis kelkaj individuoj, kiuj per intrigaj manipuloj ne nur multe malutilis al la NUK-movado mem, sed ankaŭ (ĉar mankis prudentaj argumentoj) per diversaj klaĉoj provis subfosi la reputacion de la respondeca funkciulo en la IPE-O. La NUK-anaro mem radikale ĉesigis tiun intrigadon k estas dezirinde, ke la malkontentuloj komprenis, ke kiel IPE-anoj ili *lojale* devas rilati al IPE k ties instancoj.

**Norvegio**

Norvegio, malgraŭ somersezono jam troviĝas en profunda vintrodormo. Laŭraporto de 1.2.35. la Norvegia UK sin reorganizis k starigis PEK-Centron. Per la sama raporto NorUK ankaŭ deklaris sin preta laŭ nia propono transpreni la distribuadon de SP al norvegiaj k-doj-abonantoj.

Sed poste perdiĝis la kontakto k respondon ni ĝis la lasta tempo ne ricevis. Ankaŭ pri norvegia LEA, kies estraro konsistas el 7 anoj k el kiuj 4 estas IPE-anoj ni ne plu aŭdis vorton.

Plej gravan malzorgemon de NorUK malkaŝis al ni letero de SP-abonanto (Karl Eggan) plendanta, ke li k aliaj abonantoj jam dum kelkaj monatoj ne plu ricevis SP-on. Ni tuj havigis al la abonantoj la gazetojn lastnumerajn k dume ekspediĝas al ili la necesajn ekzemplerojn rekte.

**Saarregiono**

(Raportanto legas lastan leteron, kiun IPE-O ricevis. Provoj poste pri interligiĝo estis senrezulta.)

**Sovetio**

Ĉar kun Sovetio ni havis interrilatojn, kiuj krome koncernas nian laboron pri SP, ni ankaŭ raportos pri tio sub punkto « Raporto de la SP-Redakcio ».

**Svedio**

Kun Svedio ĉiam estis bonaj interrilatoj. K-do Boman akurate dissendis SP-ekzemplerojn k ordigis financajn aferojn (IPE-kotizo, abonmono).

En la komenco de la periodo post IPE-konferenco ni kelkfoje provis interrilatiĝi kun la t.n. « Tutskandinavia Centro », pri kies fondiĝo oni decidis dum la IPE-konferenco. Ni sendis regule tien SP-ekzemplerojn. Sed ĉar poste montriĝis, ke tiu « Centro » en la realo tute ne ekzistas, nenion entreprenis k neniam respondis, ni poste ĉesigis ĉian demandadon k ankaŭ ne plu ekspedis SP-on al ĝi.

**Svisio**

Dum la sufiĉe regula interkorespondado kun la Svisia UK ni pri diversaj, organizaj demandoj (uf ktp) havis interkonsiliĝon, speciale tiam, kiam urĝo ne permesis al SvUK turni sin al la IPE-C. La neapero de SvUK-organoj (organiza k PEK-bultenoj) certe kunkaŭzas, ke la movado momente malviglas.

**Usono**

Lastatempe ŝajne vigliĝis nia movado en Usono k per tio ankaŭ la interrilato kun Nordamerika LEA. Malagrablaĵojn ni havis kun NA-LEA pro nealveno de SP ĉe kelkaj abonantoj. Ĉar la gazetoj ĉiam orde estis senditaj, ni ne povis diveni la kaŭzon de la nealveno. Tamen ni sendis ankoraŭfoje la tutan kvanton de nealvenintaj ekzempleroj. Per responda letero ni sciiĝis pri la likvidiĝo de la perturbo k aldonita listo pri ŝanĝitaj adresoj klarigis iomete pri la kaŭzo de la nealveno de gazetoj.

Ni utiligis nian korespondadon kun NA-LEA por instigi ĝin al pli konkreta laboro. Ĉar NA-LEA krom « Informilo » ne aperigas regulan organon, ni akcentis la neceson koncentri la fortojn je tia eldono k poste proponis, ke oni okupu sin pri la eblo uzi paĝon en britia «Ruĝa Esp-isto». Tio ŝajnas al la Nordamerikaj k-doj ne malbona solvo k k-do Bonesper en sia lasta letero komunikis, ke li « parolas kun sia bando pri tio ».

**Diversaj rilatoj**

Krom la ligoj kun la IPE-organizoj ni havis ankoraŭ interrilatojn kun diversaj grupoj de esp-istoj.

Antaŭ nelonge okazis etskala interkorespondado kaŭze de uf-konsideroj kun svisiaj laboristaj esp-istoj. Krome ni longan tempon havis kontakton per SP kun jugoslaviaj k-doj, kiuj rompiĝis k renoviĝis nun jus antaŭ kelkaj semajnoj.

Fine ni menciu la helpon, kiun donas al ni k-do L. en Polio, kolektante por ni SP-abonojn k ebligante al ni aperigon de artikolo pri IPE, aperinta en la n-o 5 (Junio 1935) de la laboristesp-ista organo « Lingvo Internacia ».

La raporto montras, ke certe dum la lasta jaro ne ĉio iris glate. Ni tamen havas neniun motivon, fermi okulojn antaŭ malfacilaĵoj. Fakto estas, ke IPE en si mem konsolidiĝis, povis pligrandigi la nombron de siaj organizoj k disponas pri ŝatinda nombro da *aktivaj* anoj. Pri tiu membrocifero ni volas fari kelkajn indikojn, ĉar ni kelkfoje ricevas demandojn pri tio aŭ legis fantaziajn klarigojn.

Ni dissendis k disdonis entute 422 membrokartojn de IPE por la UK-oj k por Nordamerika LEA. Do ĉiujn UK-ojn ni ne plu bezonas kalkuli aparte, sciante, ke estas kune por:

| | | |
|---|---|---|
| ĉiuj UK-oj k por NALEA | 422 | |
| Aŭstralio | 50 | (supozite) |
| Britio | 220 | (laŭ raporto) |
| Francio | 1081 | (laŭ raporto) |
| SEU | 11195 | (laŭ raporto) |
| sume: | 12968 | |

Laŭ tio ni sole en ekstersovetiaj landoj havas 1773 membrojn, do multe super 500 pli ol SAT (kun 1244 membroj). Sed al tiuj certaj ciferoj ni devas aldoni ankoraŭ la membrociferon de niaj organizoj en faŝismaj landoj. Ni kalkulis laŭ tute singarda takso k pretaj akcepti protestojn pro tro etnombraj indikoj, por

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstrio | 100 | |
| Germanio | 500 | |
| Ĉinio | 50 | |
| Japanio | 50 | (kio konformas kun la raporto de Kobe-anoj). |
| Hispanio | 30 | |
| Aliaj landoj | 30 | |
| kune: | 760 | |

Aldonitaj al 1773 ni ricevas sumon de *2533* anoj en ekstersovetiaj landoj! aŭ pli ol la duoblan membrociferon de SAT.

Kun la sovetiaj k-doj nia Internacio havas entute 13.728 anojn aŭ dekunuoble pli ol SAT. Tiun ĉi konstaton ni faru, por doni objektivan (eble tro « objektivan »!) bildon pri la fortoj de nia movado.

Multe devas pliboniĝi en la UK-oj. Ni ne hezitas diri, ke la rilato kun kelka UK-o estis absolute malsufiĉa. Multaj instigoj pri aranĝo de PEK-laboro, pri regula aperigo de PEK- k UK-bultenoj restis neatentitaj. Kelkfoje internaj disputoj, kaŭzitaj de senrespondecaj elementoj treege malutilis al la movado, speciale en Nederlando. Partopreno de UK-estraranoj en tiaj aferoj eĉ minacis la unuecon de nia movado en la koncernaj lokoj.

Preskaŭ ĉio estas farenda rilate ordigon de la organizado en UK-oj. La fakto, ke UK estas nur provizora organiza unuo de IPE unuflanke kondukas al malatento pri memstarigaj, varbaj laboroj en la rondoj de neIPE-anoj, aliflanke akcelas la tendencon memstariĝi kiel « sekcio ».

La ligado de la membroj al koncerna UK estas pliintensivigenda. La financaj aferoj ofte bezonas urĝan korekton. *Estonte, en landoj kie estas eble, IPE-ano nur povas esti konsiderata tiu, kiu posedas IPE-membrokarton (aŭ membrolibron de sia LEA) k pagis la kotizojn al sia IPE-organizo.* Per tio ankaŭ ordiĝas la rilatoj koncernaj kun IPE-O mem.

Ĉiuj organizoj de IPE pli bone devas atenti direktivojn donitajn ĝenerale. Speciale tio validas koncerne niajn k-dojn en faŝismaj landoj, kiuj bezonas nian plenan subtenon. Legu jenan amaran konstaton de niaj aŭstriaj k-doj (PEK de Aŭstrio n-o 8) k vi komprenas, kioman devon ni havas, ĉiel aktive subteni tiujn k-dojn k montri al ili nian admiron k respekton.

IPE-anaro estas grandnombra. Ni havas multajn perspektivojn, se ni plilarĝigas nian laboron, tiel rilate ĉiudetalan firmigadon de nia propra organizo, kiel rilate pligrandigon de nia influo inter ĉiutendencaj proletaj k progresemaj esp-istoj, serve al la batalo kontraŭ faŝismo k milito.

IPE-aneco signifas senfinan ĉenon da devoj. Ni laŭkapable plenumu niajn devojn, por esti indaj IPE-anoj. (Aplaŭdoj.)

## RAPORTOJ DE DIVERSAJ LANDOJ

PREZIDANTO: Kiu volas demandi ion pri la raportoj demandu. Post tio la landaj reprezentantoj donu siajn raportojn k tiam estas la ĝenerala diskuto pri ĉiuj raportoj kune. (Konsentite.)

K-do MEIJER (Nederlando): Kelkaj k-doj en Amsterdam malamikiĝis kun la estraro, sed la k-doj estas bonaj kunlaborantoj. Estas do nur persona afero.

K-do TANGVAAL (Svedio): La tutskandinavia komitato ne bone funkcias. Tion kulpas la estraro, kiu faris nenian laboron. Mi kredas, ke la komitato povas fari bonan laboron. Ni skribis al la daniaj k norvegiaj k-doj, sed ili neniam respondis.

## RAPORTO DE BRITIA LEA

K-do SMITH (prezentas raporton de Britia LEA): Antaŭ ol raporti pri tio kion BLEA ingis dum la pasinta jaro, estus dezirinde havi taŭ si skizojn de la taskoj kiujn BLEA, kiel kcio de IPE devus esti plenumintaj. Uzante mezurilon estos pli facile, taksi la gradon la sukcesoj k malsukcesoj atingitaj, k vidi, kiuj fakoj necesas speciale direkti la atenton. Unuavice staras la PEK-laboro, kiu, laŭ klaro de la Lille-Konferenco estas la bazano de IPE. La PEK-laboron oni povas dividi tri fakojn. La unua k ĉefa estas la kolektiva respondado. La dua estas la provizo de materio por uzo eksterlande, ĉu per la PEK-Bulteno, per ekta sendado de artikoloj aŭ jurnaloj. tria estas la uzo enlande de la materialo evita per la PEK-aparato.

Por provizi la bazon por tiu aparato bezona organizo-membraro k financo kreskantaj la bezonoj de la laboro. Ĉar la laboro estas ita en k per la lingvo esp-o, oni devas doni nton al la neceso atingi sufiĉe altan scion de lingvo inter la anoj.

Sekvas la rilatoj de la LEA kun ĝia ekstera ndo, unue kun la internacia movado IPE. LEA devas plenumi sian parton en la vivo IPE, en la subteno de la Int. organo k en la ovizo k utiligo de la literaturo. Due, estas la ima kontakto kiun la laborista esp-movado havi kun la ĝenerala lab. movado, k la kiun havas la IPE-sekcioj atingi uf-an don kun aliaj — precipe lab-tendencaj esp-oj.

Nun mi povas pli detale raporti, kion BLEA aŭ provis fari. Ĝi antaŭmetis antaŭ si kiel taskon la PEK-laboron. Ĉe ĉiuj niaj distaj konferencoj, ĉe BLEA-konferenco, la ĉefa pritraktata estas ĉiam la PEK-laboro. Nia estas, ke ĉiu filio estu PEK-filio, k ĉiu mbro estu PEK-laboranto. Tiun celon ni ankoraŭ ne atingis. Kelkaj filioj k multaj membroj aŭ tute ne faras PEK-laboron, aŭ faras tive malmulton. Tion ni ja devas aliigi, cesas, ne nur admoni, instigi, sed ankaŭ inti. Tion BLEA ankaŭ faras. BLEA estas dita en tri distriktojn, k depost nia nacia nferenco en Junio ĉiuj tri distriktoj difinis on por speciale prizorgi k organizi la PEK-oron en sia distrikto. Super ĉio estas la Landa K-Centro, kiu, mi opinias estas sufiĉe bone rata en la IPE-movado.

En la 3 fakoj, kion ni atingis? Dum la 11 natoj antaŭ nia Konferenco en Junio, funkci-42 kolektivaj korespondadoj. Aldone al tio devas kalkuli la multan laboron ofte elzitan por komenci korespondon, kiu tamen nerespondo el eksterlando aŭ pro alia kaŭzo estas kalkulita en la cifero. En tiu laboro kaj filioj elstaras, precipe la Edinburga. koraŭ ni trovas, ke k-doj aŭ ne bone komas en kio konsistas la kolektiva korespondo, ne pretas doni sufiĉe da energio, da iniciato supervenki la malfacilojn. Ĉar malfaciloj ja estas. Oni devas trovi rimedon kontaktiĝi kun ĉiu laboristoj en fabriko, aŭ en sindikata filio, as venki la kontraŭemon de reformistaj oficj. Por helpi en praktika maniero, nia PEK-ntro jam de longe eldonis direktivon donantan konsilon pri metodoj ktp. PEK-C nun pripreparas prepari tute novan pli ampleksan direkt-n. Nia plano por la venonta jaro donas la de 115. Tio estas, devas funkcii dum la 115 kolektivaj korespondadoj. Ne ĉiu filio eptis tiun taskon en ĝia tuto, tamen oni celas dan kreskon. En la 2-a fako ni regule el- la PEK-Bultenon, kiu estas sendita en kvarto de prok. 150 al 22 landoj. Krom artikoloj estis senditaj rekte al jurnaloj por uzo sen atendi aperon de la Bulteno. En tiu ankaŭ nur kelkaj aktivaj filioj sendis la ulton de la materialo. Filio Sheffield meritas cialan mencion. En tiu fako 92 artikoloj estis aj dum la 11 monatoj, sed tio ne sufiĉas por nuna malgranda membraro de BLEA. Plan- por venonta jaro estas 216.

En la 3-a fako, efektive brila sukceso estas la lingva PEK-Bulteno «Contact», kies dis-, nun en presita formo, atingis pli ol 2 ... lanas duobligi tiun ciferon je la fino de la plan-jaro. K-doj! ni fieras pri tiu atingo, sed ni tute ne fanfaronas. En Bulgario oni disvendis 10.000 de sia Bulteno. Restas ja multon fari! (Aplaŭdoj.)

Vi jam notis, ke ni planas nian laboron. Ni donas difinitan celon al la diversaj filioj. Ni ne ĉiam trafas la celon, sed la ekzisto de klara celo, multe helpas, ĝi estas bona instigilo. Sed la taskoj — la planceloj — ne estas nur fantaziaj aferoj. Tute male, la distriktaj komitatoj zorge konsideras la eblojn en la koncernaj filioj. Je la fino de la 2-a duonjaro ni kontrolas la ciferojn atingitajn k denove je fino de la tuta jaro k presigas la rezultojn.

Eldonagado konsistis el la tri periodaĵoj: Ruĝa Esp-isto, la monata oficiala organo hektografita; PEK-Bulteno, ankaŭ hektografita k la presita «Contact». BLEA ĝis nun ne esis sufiĉe forta eldoni aliajn verkojn. Ĉe la Nacia Konferenco, oni difinis taskon por la EK eldoni broŝuron, eble 24-paĝan, en angla lingvo, pri la ĝenerala temo «Laborista Esp. movado» por disvendi inter la laboristaro. Tion ni eble sukcesos fari dum la vintro. Estos ja modesta eldono, sed eĉ tio s'recos nian forton.

Tiel estas ĉiam frata konkurado inter la distriktoj, por gajni la plej bonajn rezultojn. Tamen, mi volas konfesi, ke nur tro malofte la plano ne estas plene plenumita. Ne ĉiu k-do estas iu Turner aŭ Wallace aŭ —, k ne gravas kiom zorge la komitato organizas k planas; se la individua membro en la filio ne faras sian parton, estos maltrafo. Estas vi, viculoj, sur kiuj tiom kiom la funkciuloj la respondeco restas.

En la kampo de organizo, ni ne tiom bone faris. Ni ne sukcesis multe pligrandigi la membraron. Ĉe la tutlanda konferenco de BLEA en Junio ni raportis, ke la kotizpagintaj membroj sumis 220. Je la sama tempo en pasinta jaro, la cifero estis 210. En kelkaj lokoj la stato ankoraŭ ne estas stabila. Oni starigas filion sur bazo de kelkaj simpatiaj personoj, foje etburĝoj, estas kurso, sed dum la afero estas ankoraŭ malgranda k malforta, okazas transloĝiĝo de gvidanto aŭ kursestro, aŭ estas geedziĝo k la filio disfalas. Tio okazas. La distrikta komitato suda intencas koncentri la atenton je 5 filioj, ĝis ili plikreskas sufiĉe por esti stabilaj. Alia kaŭzo de malsukseco en varbado estis manko de superaj kursoj, per kiuj oni povas pli facile varbi la kursanojn. Nia Lingva Komitato jam preparas forigi tiun mankon.

La financa stato de BLEA estas relative kontentiga. Ni havas saldon k la interna organizo estas sufiĉe forta. Mankas, tamen, rezervo de spertaj K-doj por la gvidpostenoj, k nia tasko estas entiri novajn K-dojn en iu gvidlaboro.

En la lingva kampo, la laboro estis bona, sed ne vasta. Nia Lingva Komitato atentis ĉefe la instruadon. Ni havas sistemon de raportado per, kiu ĉiu filio ĉiumonate raportas al sia distrikta komitato pri la faroj de la monato en ĉiuj fakoj. La raporto pri instruado estas sur aparta folio, k per tio la Lingva Komitato povas sekvi la progreson de ĉiuj kursanoj. Estas nun regulaj ekzamenoj k la gajnintoj ricevas belan diplomon. Dum proksima jaro, la L.K. havas la taskon ellabori superan kurson. Malsano kaŭzis ŝanĝon en la personaro de la LK k iom rompis la aferon en Ruĝa Esp-isto de la paĝo por lingvaj studentoj. Sur la internacia kampo, la LK verkis kritikan artikolon en SP pri la lingvaĵo de la PEK-Bultenoj. Laboro pri kompilado de teknikaj vortaroj ĝis nun estas malgranda. Dum la pasinta jaro, la LK forjetis la tutan korespondan kurson, restintan de la SAT-periodo, ĉar ĝi estis netaŭga, k verkis novan. Mi turnas min nun al la internacia kampo. En tiu sfero estas nature malpli raporti. Ni plenumis la rutintaskojn de la organizo — sendis regule kopiojn de protokoloj de EK-kunsidoj k ekzemplerojn de ĉiu eldono al IPE-C k IPE-O. Pagis nian kotizon al IPE sur bazo de dekono de la naciaj kotizoj. Nia LK kontribuis artikolon al SP. Vendo de SP estas proksimume 109. Tio estas — ĉiu dua membro de BLEA aĉetas ĝin. Sed tio ne sufiĉas. Nia nacia konferenco rekomendis ke ĉiu uno abonu SP-on. Eble tio ne estas tute realigebla, sed ni celas tion. Nia laboro ekster Britio bedaŭrinde ne estas multa. Laboro en la kolonioj estas tre malfacila pro la severa cenzurado kiu tie regas k la fakto ke en multaj lokoj ne ekzistas eĉ la komenco de organizo. Aŭstralio estas escepto. Tie nun ekzistas LEA. Ni ankoraŭ sendas regule faskon de Ruĝa Esp-isto k helpis per sendo de Petro-lecionaro, PEK direktivoj ktp. Hindio restas nigra makulo. Al kelkaj adresoj ni sendas RE-on, sed ne sciis pri la utiligo. En Sarawak ni havas membron kiu komencas aktive labori. Ni kontaktiĝis lin kun Ĉinia movado. Al Kanado ni sendas fasketon de Ruĝa Esp-isto, sed nur al unu adreso. Kanado estas duon-kontinento. LEA-NA devus prizorgi tiun landon, sed ŝajne mem bezonas prizorgon. Al ili ni sen lis lecionaron, PEK-direktivojn, ktp.

Restas la ekster BLEA-rilatoj en Britio mem. Unue, kun la ĝenerala lab-movado ni kontaktiĝas kiom eble. La BLEA estas ofte vidata ĉe la grandaj demonstracioj, kiaj tiu kontraŭ la faŝisto Mosley en Parko Hyde, k ni regule sendas RE al la maldekstremaj organizoj. Ni filiiĝis al Marks-Lernejo, Lab-Esplora Fako, k la Komitato por Majtago. Krom tio la PEK-laboro komprenoble kontaktigas nin kun la movado. Tio estas ja la celo. PEK-artikolo en vicula jurnalo estas bona ekzemplo. Pri nia unuecfronta agado, vi povas legi en kuranta numero de SP. Ni trovis ke neeblas interkonsenti kun SATEB kiel organizo, sed kun individuaj SAT-anoj eble jes. Londona grupo de SATEB sendis frat-deligiton al nia tutlanda konferenco eĉ kontraŭ la volo de la nacia komitato. (Aplaŭdoj.)

Daŭrigo de la **PROTOKOLARO** en venonta n-o de SP.

**Internacia PEK-Centro (IPC)**
Adreso:
B. Turner, Dundeestr. 60
EDINBURG, Skotlando.

## REZOLUCIO PRI BATALO POR PACO KAJ KONTRAŬ FAŜISMO

(Gvidrezolucio)

unanime akceptita en la 2-a IPE-Kongreso.

La dua IPE-mondkongreso, aŭskultinte la ideologian raporton de IPE-C, diskutinte la staton k la taskojn de la esp-movado en la nuna mondsituacio, interŝanĝinte la sperton pri unueca agado de proletaj k progresemaj esp-istoj en diversaj landoj, faras jenajn konkludojn:

1. La kapitalisma sistemo de mastrumado pruvis sian bankrotecon, ne povinte dum la lastaj sep jaroj likvidi la teruran ekonomian krizon, kiu ampleksis la tutan mondon k fariĝis senespere konstanta. Ĝi kreis milionan armeon de senlaboruloj, de senhejmuloj k malsatantoj. Ĝi putrigas ĉiujn materiajn k kulturajn valorojn de la homaro.
2. Por trovi eliron por kelka tempo, la kapitalistaro en diversaj landoj k en diversaj gradoj starigas la faŝismon, t.e. la plej malkaŝan k krudan diktutaron de la financa kapitalo. Ĝi senkompate grandigis la ekspluatadon al la laboristoj k kamparanoj k laborintelektularo por konservi k grandigi siajn profitojn. Ĝi sange persekutas la laboristan k ĉiun progreseman movadon k subpremas la elementajn homrajtojn. Ĝi ruinigas la kulturon, la artojn k la sciencojn. Ĝi dissemas bestecan malamon inter la diversaj nacioj. Sian savon ĝi atendas de nova rabista milito por redivido de la mondo. La febraj armiĝoj de la imperialismaj ŝtatoj, precipe de Germanio k de Japanio, atingis tian gradon, ke oni povas atendi la eksplodon de nova mondbuĉado ĉiutempe.
3. Nur en Sovet-Unio, kiu sukcesis forigi ĉe si la kapitalisman sistemon, forestas krizo, senlaboreco k mizero, kreskas la bonstato, la kulturo k demokrateco inter laboruloj, sur bazo de internacia frateco de diversaj nacioj. Sovetio estas la plej forta bastiono de la internacia laborista movado k de l'homara progreso. Ĝi

faras la plej grandajn klopodojn por konservi la tutmondan pacon pro la socialisma konstruado k pro la bono de laborulaj amasoj sur la tero. Kontraŭ ĝi unuavice direktiĝas la militaj aspiroj de faŝismo.

4. La danĝero, kiu minacas per faŝismo k milito al la kulturo, vivo k estonteco de la homaro, vokas ĉiujn laboristojn, kamparanojn, intelektulojn k ĉiujn progresemajn homojn el ĉiuj popoloj, en propra intereso k en interesoj de la nova generacio, senprokraste ekagi por defendo de la socio kontraŭ faŝismo, por konservo de la paco, por malhelpo al atakoj kontraŭ Sovet-Unio. Jam nun ni spertas en plej diversaj landoj la grandan ondon de l'antifaŝista agado, de kontraŭmilita klopodo de la amasoj.
   Ni vidas la starigon de la proleta uf inter diversaj organizoj, ni vidas kreiĝon de multaj antifaŝistaj k antimilitaj komitatoj, kiujn partoprenas la plej bonaj reprezentantoj de la progresema intelektularo — famaj scienculoj, artistoj, verkistoj.
5. La esp-istaro, kvankam historie necese dividita en proletan k tiel nomatan neŭtralan alon, en sia plimulto apartenas al la progresema parto de l'homaro, unue pro kompreno de la granda internaciiga k interkompreniga valoro kiu kuŝas en apliko de esp-o por internaciaj rilatoj k due pro sia socia konsisto — plej multe laboristoj, oficistoj k intelektuloj, kiuj ne agnoskas la faŝismon k malemas al milito. La esp-istoj tial devas esti la plej aktivaj partoprenantoj de la granda socia movado por paco k kontraŭ faŝisma perforto. Ili ne havas moralan rajton resti senfaraj, kiam la interesoj de l'homaro postulas la servigon de la bonega k taŭga ilo, kiun ili posedas al tiu plej aktuala k vivnecesa celo.
6. La efika laboro de ĉiuj progresemaj esp-istoj tamen nur eblas, se oni kunigas siajn fortojn en ĉiuj landoj sur bazo de praktika utiligo de esp-o al la neesp-istaj laborulaj k progresemaj amasoj. Tial IPE, la plej granda esp-o-organizo en la mondo, fidela al sia celo, servi per esp-o al la socialisma liberigo de la laborula homaro, reakcentante siajn iniciatojn faritajn ĉe la fondkongreso de IPE en Berlin en 1932 k ĉe la Lille-a konferenco en 1934, reakcentante siajn klopodojn, faritajn en diversaj landoj, ĝis nun por organizi unuecan agadon de laboristaj esp-istoj k kooperadon kun progresemaj esp-istoj sincere proponas de esp-o uf-aj laboristaj esp-organizoj, en oj uf-on de agado, por komuna servigo de esp-o uf-aj laborista esp-organizoj, en batalo kontraŭ faŝismo k milito k samtempe proponas ankaŭ praktikan kooperon al ĉiuj pacamaj k antifaŝistemaj esp-istoj el neŭtralaj organizoj.
7. IPE deklaras, ke la fina celo de la uf-a komuna laboro, kun aliaj esp-laboristaj organizoj, estas elforĝi la bazon por la organiza unueciĝo de ĉiuj proletaj esp-istoj en unu laborist-esp-ista Internacio.
   Kiel bazon por la organiza unueco la IPE-kongreso konsideras:
   1. Ideologion de klasbatalo k de proleta internaciismo.
   2. Servigon de esp-o al la klasbatala laborista movado, ĉefe per PEK.
   3. Aktivan partoprenon en la antifaŝista k antiimperialista batalo de la proletaro.
   4. Internacian organizmanieron sur bazo de demokrateco k delegitsistemo.

   Kiel bazon por la kontraktoj pri starigo de uf la kongreso aprobas la proponaron, ellaboritan de la IPE-sekretariaro, publikigitan en SP, n-o 31.
   La IPE-C, la sekciaj komitatoj, regionaj k la lokaj grupoj de IPE estas komisiataj daŭrigi aŭ rekomenci la traktojn pri uf sur bazo de la IPE-proponaro kun la necesaj adaptoj kun la grupoj distriktaj k landaj laboristaj esp-organizoj. IPE alvokas ĉiujn amikojn de unueco en la laborista esp-istaro helpi al ĝi en tiuj klopodoj spite al ĉiuj kontraŭagoj de kelkaj ambiciemaj gvidantoj.
8. Konsiderante la uf-on de laboristaj esp-istoj kiel la ĉefan faktoron de esp-istoj kontraŭfaŝista k kontraŭmilita agado, la kongreso tamen ne konsideras nesufiĉa la limigon de tiu agado je nuraj laboristaj esp-organizoj pro la ĝenerala negrandeco de la tuta esp-movado k pro la neceso eluzi ĉiujn fortojn. Tial IPE deklaras sin preta laŭ specialaj cirkonstancoj en diversaj landoj kooperi kun progresemaj k pacamaj esp-istaj grupoj, fakaj unuiĝoj k individuoj.
   Lasante flanke la diferencojn, kiuj ekzistas en la celoj de la laboristaj k neŭtralaj esp-organizoj, pri kiuj IPE rezervas sian konatan vidpunkton, IPE proponas kunlaboron, kiu konsistu en komuna partopreno ĉe ĝeneralaj antifaŝistaj k porpacaj kampanioj, en komuna organizado de antifaŝista, antimilita k antiimperialisma informado, en helpo de la PEK-filioj ĉiulandaj, en komuna klopodo por enkonduko de esp-o en la popollernejoj k ĝia utiligo por progresemaj k kulturaj celoj.
   La kongreso alvokas ĉiujn IPE-organizojn subteni la klopodojn por arigo de progresemaj esp-istoj k helpi al iliaj grupoj speciale en la teroraj k dependaj landoj.
9. Proponante vastan unuecan agadon, IPE tamen deklaras, ke ĝi per tio neniel reiras de siaj pozicioj k principoj, deklaritaj ĉe la fondkongreso de IPE, kiuj baziĝas sur la proleta internaciismo k sur praktika servigo de esp-o al la revolucia klasbatalo.
   Sur la ideologia fronto IPE unuavice kontraŭbatalas la faŝisman ideologion, la rasisman k naciisman, kiuj penetris la neŭtralan movadon. Samtiel IPE kontraŭbatalas la porimperialisman k kontraŭsovetian sennaciismon de Lanti. IPE kontraŭbatalos ĉiujn grupojn k ideojn, kiuj tendencas al disigo de la laborista unueco per starigo de nova internacio kontraŭ la proleta unueco. Ĝi kondukos senkompatan batalon kontraŭ la dissemo de mensogoj pri la patrio de tutmonda proletaro — Sovetio k kontraŭ ĉiuj ĝiaj malamikoj. Ĝi ne ĉesos forigadi la iluziojn pri la eblo de paco per demokrateca reformo de kapitalista sistemo al socialismo aŭ pri eblo de tiametoda malaperigo de faŝismo, iluziojn kiuj ankoraŭ estas disvastigataj de kelkaj reformistaj gvidantoj. IPE ĝoje konstatas la kreskon de la revoluciema konscio k de simpatio al Sovet-Unio inter la membroj de SAT, de ISE k de la socialistemaj LEA-oj k deklaras ke la deklaracio akceptita de la 1-a IPE-kongreso en 1932 pri tio ke IPE kontraŭbatalas kiom la oportunisman sennaciismon « ankaŭ reformisman ideologiom de socialdemokratio, subtenanta la imperialismajn rabadon k militon, kiu plenumas la taskojn deteni laboristojn de la klasbatalo k malhelpas efektivigon de ruĝa unueca fronto », neniam direktiĝis kontraŭ socialistaj laboristoj k nuntempe perdas sian aktualecon. Ĝi nome konsideras, ke tiu klaspaca ideologio speciale disvastigata antaŭ la ekrego de Hitlera faŝismo de la gvidantoj de socialdemokrataj organizoj, nun mem estas kontraŭbatalata de multaj socialistaj laboristoj, kiuj ĉiutage marŝante en uf pliproksimiĝas al la vidpunkto de revolucia klasbatalo.
   IPE energie repuŝas la asertojn en S-ulo k S-isto, kvazaŭ IPE malamike rilatus al socialistaj k alitendencaj kamaradoj. IPE deklaras, ke ĝi vidas en la ĉiutendencaj laboristaj esp-istoj s klasfratojn k kunbatalantojn, al kiu vojo al vicoj de IPE ĉiam estas larĝe ı fermita.
10. Konsiderinte la agadon k ideologion la tiel nomata Internacia Proleta operado, alie Internacia Propaga Komitato la kongreso konstatas, ke l fondita de kelkaj fervoruloj por orga ado de la esp-movado en la limregic de Hollando, Belgio k Germanio er pasintaj jaroj faris certan valoran labo helpinte al starigo k vigligo de nc grupoj k al la interligo. Tamen tiu lal ne ĉiam helpis al la organiza laboro niaj UK-oj k sekcioj, kiel ekzemple Hollando. Laŭideologie IPK ne ed siajn membrojn en klara klasbatala rito k al praktika utiligo de esp-o la proletaro (PEK), metante ilian at on al nura propagando de esp-o. Tie detenis siajn membrojn aliĝi al la LE oj, jam ekzistantaj, al UK-oj k IPE- cioj k montras tendencon resti mems internacia organizo. La kongreso opin ke en la nuna situacio, kiam en la k cernaj lim-regionoj jam funkcias IPE LEA-grupoj, kiam IPE k aliaj lab- organizoj alpaŝas al uf de agado la p ekzistado de IPK nur povas malutil la unueciĝo k plua prospero de la lal ista esp-ista movado en tiuj regio Tial la kongreso alvokas al ĉiuj akt k simpatiantaj membroj de IPK lik sian apartan ekzistadon k aliĝi al la la aj LEA-oj, aliĝi al IPE por doni si fortojn al la komuna afero.
11. Iniciatante la uf-on de la laboristaj e istoj k la kooperadon de la progresei antifaŝistoj k pacemuloj en la ĝenei esp-ista movado, IPE deziras montri zemplon de konsekvenca k pionira ado. IPE deklaras sian aliĝon al « Mondkomitato kontraŭ faŝismo k r ito » por pli efike servigi esp-on al batalo en internacia skalo.
   IPE alvokas la aliajn proletajn k p gresemajn esp-organizojn sekvi al ekzemplo.
   Vivu la uf de ĉiuj proletaj esp-istoj
   Vivu la kooperado de ĉiuj progresei esp-istoj kontraŭ faŝismo k milito!
   Vivu Internacio de Proleta Espera istaro!

## Partopreno al la 2-a IPE-Kongre

| Landoj | Aligis | Delegitoj IPE | Delegitoj SAT(1) | Vizitantoj IPE | Vizitantoj SAT | [illegible] |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Belgio | 41 | 1 | — | 55 | — | [illegible] |
| Britio | 32 | 3 | 1 | 25 | — | [illegible] |
| Danio | 2 | 1 | 1 | — | — | |
| Francio | 16 | 3 | — | 10 | 3 | |
| Germanio | 7 | 2 | — | 5 | — | |
| Hispanio | 2 | — | — | 1 | — | |
| Japanio | — | 1(2) | — | — | — | |
| Kan. Insuloj | 1 | — | — | — | — | |
| Kanado | 1 | — | — | — | — | |
| Nederlando | 18 | 1 | 1 | 10 | 1 | |
| Polio | 1 | — | — | 1 | — | |
| Sovetio | 5 | — | — | — | — | |
| Svedio | 4 | 1 | — | 2 | — | |
| 13 | 130 | 13 | 3 | 109 | 4 | 1[illegible] |

(1) Kiel konate, la delegitoj de SAT ĉeestis partopreni nur la unuecfrontajn debatojn
(2) La japaniaj k-doj estis transdonintaj al dino Kandel (Nederlando) sian mandato

*Adreso de IPE-Oficejo, EKRELO, S Posteno: Postbox Z 5, Amsterdam-Nederland*